

1977 junio

70-a jaro

n-ro 858 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)


esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando

Eŭropo
diskutas
lingvajn
barojn
p. 103

Estrara raporto 1976-77



Vi trovos

kiel promesite, la Raporton de la Estraro en ĉi tiu numero. Pardonu, ke ni uzas la vorton "promesi" en ĉi tia kunteksto, ĉar ĝi ja estas rezervita por agrablaj surprizoj, premioj, donacoj kaj similaĵoj. Tamen, se vi komparas ĉi tiun numeron de la revuo kun tiu de julio/aŭgusto pasintjare, vi trovos, ke la bela vorto ne estas tute malkonvena ĉi tie. Dum la pasintjara numero kun la Raporto de la Estraro estis revuo nur laŭ sia eksterajo, ĉi-foje vi ricevas preskaŭ duonan ne-raportan revunumeron. Dank' al komunaj klopodoj de la Estraro kaj redakcio, la Raporto ŝrumpis de 20 al 13 paĝoj, kiuj ne restis sen vigligaj ilustraĵoj. Efektive, la teksto mem de la Raporto ĉi-jare duoniĝis kompare kun la pasinta jaro. Tio ja estas progreso, eble la sola kazo kiam ŝrumpo signifas progreson. Ni do esperu, ke ĉi tiu Raporto estis bona ekzerco por la Estraro, kiu lernas koncize esprimiĝi. Koncizeco povas esti bona garantio, ke oni serioze trastudos la Raporton, kaj — tio ja devus esti la fina celo de ĉiuj raportokompilantoj.

La enkonduka teksto pri la komunikado ĉefe celas instigi niajn legantojn — precipe tiujn, kiuj planis iri al la Kongreso — pensi pri tiu aktuala temo, kiu povus montriĝi interesa ponto inter la aspiroj kaj kompetentoj de la Movado kaj la priokupoj kaj bezonoj de la nuna momento en la internacia vivo ĝenerale. Sed, se kaŝaj espero de la redakcio estas, ke ĉiu revunumero havu sian "bombon" aŭ "bonbonon" — se vi tiel preferas —, tiam la "bombo" de ĉi tiu numero sendube estas la raporto de d-ro Lins pri luksemburga kongreso.

Enhavo

- 101 La rajto je komunikado: De predikado al komunikado
 - 102 Institucio Hodler '68: Financa subteno, Grava internacia kongreso: Mondcivitanoj
 - 103 Informoj de CED: Kongreso de EK debatis la lingvajn barojn (U. Lins)
 - 105 Universala Esperanto-Asocio: Raporto de la Estraro pri la agado dum la laborperiodo 1976/77, Enkonduko, Ĝeneralaj, Administrado
 - 106 Financoj
 - 107 Institucio Hodler '68, Revuo, Kongresoj
 - 108 Informado
 - 109 Eksteraj rilatoj
 - 111 Kulturo
 - 112 Junulara sekcio (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)
 - 113 Landa kaj faka agado
 - 114 Esploro kaj dokumentado
 - 115 Finaj vortoj, Financaj aldonajoj al la Raporto: Spezoj de UEA en 1976
 - 116 Bilanco de UEA je la 31a de decembro 1976, Revizora raporto, Spezokonto de la 61a UK en Ateno
 - 117 Buĝeto de UEA por la jaro 1978
 - 118 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
 - 120 Ekzameno E (B. Golden), Nekrologoj: C. Bahorić-Rukavina, E. Ionescu, J. Mautner, F. Novljan, H. Nursall, C. Pot, J. Widèn
- Anoncetoj

La kovrilo

La Eŭropa Parlamento en Luksemburgo, kies konstruaĵoj ornamas nian kovrilan paĝon ĉi-foje, povus pli efike utiligi plurajn etaĝojn de la modernaj arkitekturaj skatoloj, se ĝi pli ofte traktus la komplikecon de sia lingva situacio kaj serĉus pli klean kontribuon de miloj da oficistoj, kiuj laboras en la lingvaj servoj de EK. Tamen, oni jam ekdiskutas tiajn demandojn, ne nur en la Esperanto-movado, sed ankaŭ en ĉi tiuj konstruaĵoj mem. Legu pri tio ampleksan raporton sur niaj paĝoj 103 kaj 104.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Anonctarifo por ne-Esperantaj komercaj entreprenoj estas duobla. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de UEA-agado: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Beethovenlaan 6, Doorwerth 6865 EA, Nederlando; tel. (085) 33 56 31.

De predikado al komunikado

La ĉeftemo de la 62a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko estos "La rajto je komunikado". Kvankam tiu temo lastatempe troviĝas en la tagordoj de multaj internaciaj kunvenoj kaj en la programoj de pluraj naciaj kaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj, ĝi ne estas novaĵo por la internacia Esperanto-movado. Ne estas tiel, ke la Movado elektas por trakti temon, kiu furoras en la nuntempa internacia vivo, sed la fakto estas, ke la menciitaj internaciaj organizaĵoj kaj forumoj komencis okupiĝi pri temo, kiu enestas la fundamenton de la ideo pri komuna internacia lingvo. Tial kontribuo de esperantistoj en la diskutoj pri la komunikado povas montriĝi esenca kaj direktodona.


KONFORME al la ĝenerala inklino de la Esperanto-movado, ĉiam pli kaj pli senti sin integra parto de la hodiaŭaj tempo kaj socio, ankaŭ en la ĉi-jara Universala Kongreso rolos kiel ĉeftemo unu el tiuj demandoj, kiuj dum la lastaj jaroj altiras atenton kaj konsumas fortostreĉojn de la tuta homaro. Tio ĉi aparte validas por la internaciaj organizaĵoj, kiel ekz. Unesko, en kies programoj kaj laboroj la demandoj pri komunikado okupas ĉiam pli centran lokon. Ne unuavice pro la intimaj ligoj inter la Esperanto-movado kaj Unesko, sed antaŭ ĉio pro la baza ideo pri komuna internacia lingvo kiel komunikilo, la Movado spertas la nunan ĉefokupon de Unesko ankaŭ kiel sian propran, fundamentan aktualajon.

En la Mezperspektiva Plano de Unesko 1977–1982, aprobita dum la 19a Ĝenerala Konferenco de la monda organizaĵo, en novembro pasintjare en Nairobi, oni legas ankaŭ jenan alineon:

"Spite al tio, ke la nocio de 'la libera fluo de informoj' datiĝas de antaŭ kvindek da jaroj, ĝi elmergiĝis kiel koncepto. . . nur de post la fino de la Dua Mondmilito. . . Kvankam la vorto 'komunikado' jam estis uzata tiutempe. . . , pli-malpli ĝi signifis unuflankan distribuon de informoj. Nur multe pli poste aperis la koncepto de komunikado en ties vera senco (el la latina *communicare*: komunigi, egale dividi), ne plu signante unuavice aktivan elsendanton kaj pasivan aŭskultanton, sed permesante reagon de la lasta, aŭ eblecon modifi la konduton de la unua, aŭ eĉ pli trafe — postulante la aktivan partoprenon de ĉiuj koncernatoj en la komunikprocedo, kio do fariĝas plurdimensia fluo de la informoj, kun multobla reago."

Ĝuste tiu demando de la spertata unudirekteco de la informfluo, kune kun la libereco, kiel baza nocio, kaj teknikaj rimedoj, kiel materia portanto de la komunikprocedoj, estas la centra demando pri kiu en ĉi tiu kunteksto okupiĝas ne nur Unesko, sed pli-malpli ankaŭ ĉiuj aliaj interŝtataj kaj ŝtataj partoprenantoj en la debato. Ne necesas miri, ke la debatantoj unuavice parolas pri egalrajta distribuo de la teknologia bazo de komunikado — gazetaro, radio, televido, telefono, satelitoj ktp. — kaj apenaŭ tuŝas la alian kernan demandon, la neteknikan arkirimedon de ĉia komunikado — la lingvon. Oni diskutas pri tio, kion komuniki, kiel komuniki, per kiu teknika rimedo distribui la informojn, sed oni lasas flanken la demandon de la komunikilo mem — la lingvo —, kvazaŭ ekz. la unudirekteco de la komunikado ne estus rekta sekvo de i.a. nesolvita lingva demando.

Ne estas tiel, ke la demandoj, kiujn elstarigas Unesko ne meritas atenton. Male. Ankaŭ la Esperanto-movado bezonas diskutojn ekz. pri la libereco de la informfluo. Tio ankaŭ en la Movado ofte spertiĝas kiel problemo. Ni eĉ ne parolu pri tio, kiom koncernas ankaŭ la esperantistojn la fakto, ke la teknologiaj rimedoj de komunikado restas preskaŭ tute neatingeblaj por la informoj kaj opinioj, kiujn la Movado volus komuniki al la mondo. Ankoraŭ nun, ni preskaŭ jubile notas en la movada gazetaro ĉiun mencion pri Esperanto en la nacilingvaj komunikiloj kaj ni ankoraŭ ne eltrovis la efikan manieron konvinki la novaĵagentejojn, ke du



En televida programejo: Tekniko donas materian bazon por amaskomunikado, sed tio ankoraŭ ne estas ĉio bezonata.

Financa subteno

LA ESTRARO de la Instituto Hodler '68 kunsidis en la Centra Oficejo de UEA la 22an de majo kaj decidis jene disdividi la pasintjaran — rekorde grandan — renton de la Kapitalo Hodler:

Eldonejo Voĉo (Jugoslavio **500,00 gld.**, por la eldono de *Albana ŝlosilo* de Esperanto; Akademio de Esperanto **500,00 gld.**; al s-ro Kei Kurisu (Japanio) **400,00 gld.**, por subteni la novan periodaĵon *Pacifika lumturo*; al la Fondaĵo Canuto (UEA-membrecoj en landoj kun transpagaj problemoj) **4 000,00 gld.**; *Heroldo de Esperanto*, por ebligi eldonon de sciencaj suplementoj en tiu gazeto, **1 500,00 gld.**; urba biblioteko en Kortrijk (Belgio) **700,00 gld.**, por ĝia Esperanta sekcio; Propaganda Konto de UEA **4 400,00 gld.** Kiel konstateble, oni disponis pri 12 000,00 gld. da rento.

Pri aliaj temoj traktitaj dum la kunsido, ni klopodos raporti en niaj postaj numeroj.

mil homoj el kvindek landoj, kiuj kunvenas kaj diskutas la lingvan problemon de la mondo, estas pli grava novaĵo, ol ekz. informo, ke fama filmbelulino intencas forlasi sian kvinan edzon. Nia malsukceso ĉi-rilate ja ŝuldiĝas parte al la fakto, ke la teknikajn komunikrimedojn regas difinitaj ŝtatoj aŭ homoj, sed nia ĝeno antaŭ ĉio estas, ke la nuntempan komunikadon regas difinitaj naciaj lingvoj.

La kvar ĉefaj celoj de Unesko rilate la komunikadon estas: 1) progresigi la egalrajtecon kaj reciprokecon en la informofluoj, respektante la kulturan identecon kaj individuajn prioritatojn de ĉiuj landoj; 2) akceli kiel eble plej vastan cirkuladon de informoj, scioj kaj ideoj, sen "neglekti la protekton de aŭtoraj rajtoj"; 3) asisti ĉe esploroj kaj edukado de fakuloj pri la komunika tekniko en la landoj, kie sentiĝas ilia manko; 4) preventi la vastiĝon de la breĉo inter la industriaj kaj evoluantaj landoj rilate la posedon de la teknologiaj komunikrimedoj. Ĉiu el la kvar demandoj ja estas aktuala kaj meritas fortostreĉojn, kiuj kondukus al kontentiga solvo. Tamen, almenaŭ ni en la Movado devus senti, ke en la programo mankas celo, kiu premias pozitivan evoluon de la klopodoj solvi la kvar listigitajn problemojn. Tiu celo estas al la Movado bone konata: havigi al la homaro egalrajtajn ŝancojn de komunikado, donante al ĝi internacian komunikilon en la formo de neŭtrala internacia lingvo. Sen tio, la ĝena unudirekteco de la informofluoj restas ankoraŭ longe reganta en la kampo de la komunikado. Sen tio la egalrajteco kaj precipe la "libereco", tiel de individuoj, kiel de la plimulto de la nacioj, restas himero, kiu foje povas aspekti pli aŭ malpli nebuleca.

La esenca demando pri libereco kaj egalrajteco en la komunikado ne dependas nur de tio en kiom da ŝtataj

konstitucioj kaj internaciaj konvencioj ĝi estos "garantiita", sed de la fakto ĝis kiu grado la homaro havos je la dispono facilan, supernacian, neprivilegiigan, neŭtralan komunikilon, ne en la formo de kiom ajn inĝenia komunika satelito, sed en la simpla formo de komuna internacia lingvo, sen kiu libera internacia komunikado restas malebla. Tio, kion oni nuntempe nomas komunikado, efektive estas predikado. Ĝi restos tio, ĝis oni diskutos pri komunikado inter tiuj, kiuj havis ŝancon kaj monon spertiĝi en pluraj naciaj lingvoj, aŭ kiuj ankaŭ nun okupas funkciojn, ebligantajn al ili dungigi interpretiston aŭ ĝui la mankan avantaĝon provizatan de la multekostaj teknikaj komunikrimedoj. Ĝis oni adoptos komunan komunikilon, ne por elito de predikantaj funkciuloj, sed por la plej larĝaj amasoj de la t.n. simplaj homoj, la komunikado restos problemo. Kvankam oni jam plurfoje anoncis revoluciojn sur ĉi tiu kampo de la homa vivo, kvankam oni ĉi tiun epokon ofte etikedas kiel epokon de amaskomunikiloj, la vera revolucio en la komunikado ankoraŭ ne okazis, ĉar la revolucia amaskomunikilo — la Internacia Lingvo — ankoraŭ ne elbatalis sian ĝeneralan akceptitecon. La fakto, ke ne nur Unesko, sed ankaŭ pluraj aliaj internaciaj forumoj (ekz. la eksterblokaj landoj) jam traktas teknikajn aspektojn kaj problemojn de la komunikado, klare signas, ke la breĉo — ni uzu tiun furoran esprimon — inter la Esperanto-movado kaj la porparolantoj de la teknika solvo de la lingva problemo ĉiam pli malgrandiĝas. Oni estas survoje! Oni proksimiĝas al niaj konceptoj pri komunikado! Tion bele atestas ankaŭ la raporto, kiu sekvas sur la paĝo 103.

GRAVA INTERNACIA KONGRESO:

Mondcivitanoj

SE VI DECIDIS ne iri al la UK en Rejkjaviko, kaj tamen volas grave helpi Esperanton, pripensu jenan eblecon:

Okazos en Parizo, de la 1-a ĝis la 10a de julio 1977, la 2a Kongreso de la Mondcivitanoj kaj Mondfederaciistoj (unua okazis en San Francisko en 1975).

Kvankam la kongresaj laborlingvoj estos la angla, franca kaj japana, por la unua fojo ankaŭ Esperanto estos uzebla, kondiĉe, ke esperantistoj (ne nepre membroj de la du movadoj) ĉeestu en la kongreso. La ĉefaj diskuttemoj estos: "Konstrui mondan komunumon" (por la mond-civitanoj) kaj "Al nova monda ekonomia ordo" (por la mondfederaciistoj). Sian partoprenon en la kongresaj debatoj anoncis multaj eminentuloj, inter kiuj ankaŭ pluraj nobelpremiitoj. Se vi volas kunhelpi la enkondukon de Esperanto en ĉi tiun internacian medion, per via partopreno en la kongreso, petu pliajn detalojn de la subskribinto.

R. Volpelière,

8, rue Rouget de Lisle, F-30000 Nîmes, Francio

Kongreso de EK debatis la lingvajn barojn

De la 3a ĝis la 6a de majo 1977, en Luksemburgo okazis kongreso, organizita de la Komisiono de Eŭropa Komunumo. La temo de la kongreso estis: "Venki la lingvan baron". Inter pli ol 300 partoprenantoj troviĝis ankaŭ d-ro Ulrich Lins, estrarano de CED, kiu, komisie de la Estraro, iris tien por reprezenti UEA. Jen lia raporto:

KE ĜUSTE LA KOMISIONO de la Eŭropa Komunumo (EK) organizis kongreson pri la demando kiel venki la lingvan baron, estas fakto, kiu incitas atenton. La Komisiono estas la "registaro" de la "Eŭropo de naŭ landoj", nome Belgio, Britio, Danlando, Francio, FR Germanio, Irlando, Italio, Luksemburgo kaj Nederlando, kies ekonomia kaj politika integriĝo pli-malpli rapide progresas kaj al kiuj eble baldaŭ aliĝos ankaŭ Greklando, Hispanio kaj Portugalio. Lingvaj problemoj jam ekzistas en tiu malgranda Eŭropo, kaj ju pli da landoj konsistigos ĝin, ili des pli akriĝos. La oficialaj lingvoj en EK, formale egalrajtaj, estas nuntempe la angla, dana, franca, germana, itala kaj nederlanda. Aldoniĝus la greka, hispana, portugala . . . Kaj poste?

Altranga funkciulo de EK, la ĝenerala direktoro pri scienca kaj teknika informado, R.K. Appleyard, deklaris en sia malferma parolado, ke "niaj lingvaj kaj kulturaj diversecoj eble montriĝos la lasta kaj probable plej granda baro, tiel inter eŭropanoj, kiel ankaŭ en la konstruado de Eŭropo". Malgraŭ tiu rekono de la problemo, oni ĝis nun havis la impreson, ke EK iom hezitas diskutigi ĝin. Tial eble surprizas la fakto, ke tuta kongreso de EK estis dediĉita al la demando kiel trovi eliron el la peza ŝarĝo de multlingveco. Appleyard raportis, ke pasintjare pli ol 538 000 paĝoj estis tradukitaj kaj, ke 20% de la tuta stabo de EK laboras sur lingva kampo. Li konfesis, ke iun tagon EK estos devigita enkonduki la distingon inter laboraj kaj oficialaj lingvoj, kiel en Unuiĝintaj Nacioj, — do praktiki lingvan diskriminacion. Kaj efektive, jam en Luksemburgo la distingo estis farita: La uzataj lingvoj estis nur la angla, franca kaj germana. Kvazaŭ por trankviligi sian konsciencon, nur en kelkaj skribaj instrukcioj, ekz. pri la malpermeso de parkado antaŭ la kongresejo, oni uzis ankaŭ la danan, italan kaj nederlandan.

La precedento de Wüster

Sed, la kongreso ankoraŭ ne estis signo, ke EK intencas malfermi larĝan diskuton pri la aspektoj, ĉefe politikaj, de la lingva problemo en Eŭropo. Pli precize, temis pri la Tria Eŭropa Kongreso pri Sistemoj kaj Retoj de

Dokumentado, t.e. pri rimedoj, kiuj ebligu la aliron al scienca, teknika, socia kaj ekonomia literaturo, al la lavango da informfontoj en la mondo. Sendube, tio ĉi estas ekstreme grava kampo: Sciencistoj apenaŭ kapablas superrigardi la amason da informoj, rilataj al ilia respektiva fako, kaj sekve bezonas servon, kiu faciligos al ili rapidan trovon de diverslande dokumentitaj informoj. Tiam servon EK, post kelkjara preparlaboro, intencas instali en 1977. Sub la nomo EURONET oni volas krei "internacian transferosistemon de donitaĵoj", kiu ligu la uzanton al multnombraj diversfakaj enkomputigitaj dokumentejoj ("donitaĵ-bazoj").

Tiun ambician projekton jam traktis la antaŭaj du kongresoj (en 1973 kaj 1975), dum la ĉi-jara okupiĝis ekskluzive pri la lingvaj obstakloj, kiujn oni, funkciigante la sistemon, iamaniere devos venki. Sekve, la kongreso dividiĝis en sesiojn pri multlingva terminologio, pri homa kaj duonaŭtomata tradukado, pri tesaŭroj (t.e. vortaroj ordigitaj hierarkie laŭ la sencobranĉoj), pri aŭtomata tradukado. En ĉiu sesio specialistoj diskonigis resumojn de siaj prelegoj — la prelego-tekstojn la partoprenanto povis legi en antaŭe disponigita dika volumo* — kaj poste interdiskutis, ĉiufoje en granda salono, do ne en laborgrupoj. Tio ne ŝajnas tre efika maniero por interŝanĝo de spertoj, sed kredeble — kiel ĉe multaj similaj kongresoj — la plej fruktodonaj programeroj por samfakanoj estis la regulaj kafopaŭzoj kaj la cetera eksterprelega libertempo.

Kiajn atendojn oni ligis al la kongreso, ilustru la deklaro de brita sciencisto en la konkluda sesio, ke la prelegaro laŭ sia kvalito trovas precedenton nur en la libro *Internacia lingvonormigo en la tekniko* de Eugen Wüster el 1931. Wüster, kiun la kongreso

* Kommission der Europäischen Gemeinschaften: *Dritter Europäischer Kongress über Dokumentationssysteme und -netze. Die Überwindung der Sprachbarrieren*. Vol. 1. München: Verlag Dokumentation, 1977. 610p. Aperis ankaŭ eldonoj anglalingva (*Overcoming the Language Barrier*) kaj francelingva (*Franchir la barrière linguistique*). La dua volumo, kun ceteraj prelegoj kaj la diskutaj kontribuoj, aperos en la dua duono de 1977.

omaĝis per unuminuta silento, bedaŭrinde ne plu povas konfirmi, ĉu la diritan pretendon li akceptus.

Elpaŝo de prof. Frank

Prelegoj – entute estis ĉ. 40 – pri ekz. "La tesaŭro de la Eŭropa Bierfareja Konvencio" aŭ "La integrado de moduloj por la aŭtomata tradukado en SPLEEN kun aparta konsidero de ilia signifo por retoj de dokumentado" povus supozigi, ke la kongreso profundigis en detalojn, forgesante principajn demandojn de la lingva uzo en EK, de la kostoj de multlingveco, de la problemo de lingva egalrajteco. EK origine ŝajne ne celis levi la kongreson al nivelo, kie neeviteble estus parolo ankaŭ pri la tiklaĵoj de la lingva problemo. Tamen, unu sesio, tiu pri "Instruado kaj uzado de lingvoj en la Komunumo", permesis trakti temojn, ne rekte ligitajn al normigo aŭ maŝina tradukado. Kaj ĝuste tiu sesio, la unua de la kongresa programo, grandparte montriĝis diskutforumo pri Esperanto. Nur unu prelego kadre de tiu sesio havis temon, kiu sola meritis tutan kongreson de EK: "Problemoj de lingva komunikado en Eŭropo". La preleganto estis neniue alia ol en la Movado konata prof. Helmar Frank. Li koncize, sed lerte prezentis la problemojn, al kies traktado EK almenaŭ ne estis rekte invitinta, avertis kontraŭ nure "teknologia lingvopolitiko" kaj ligis la pli specifan temon de faciligo de inform-akirado kun la fundamenta demando kiel venki la lingvajn barojn ankaŭ ekster la rondoj de sciencistoj. Superflue diri, ke la prelego de prof. Frank estis pledo por Esperanto.

De tiam ne plu necesis "varbi" por Esperanto. La atento estis vekita. Montris tion ne nur la diskuto post la prelego, sed ankaŭ konversacioj dum la vespera akcepto ofertita de la luksemburga registaro. Ne mankis, kompreneble, skeptiko, eĉ negativaj voĉoj (precipe de anoj de unu granda nacio), sed pluraj delegitoj evidente "malkovris Amerikon", lernante pri la sistemo de radikoj kaj afiksoj en Esperanto; ĉe kelkaj, la Zamenhofa tabelo de korelativoj havis – naŭdek jarojn post sia apero – renesancon de popularco. Aliaj oficialaj prelegantoj poste zorgis, ke la efiko de la franka instigo ne pasu. La italo F.S. Chiappetti, la brito Ian D.K. Kelly kaj la germano Heinz-Dieter Maas, menciante la eksperimentadon pri Esperanto en sia faka laboro – kiel tute normalan objekton de esploroj –, helpis komprenigi, ke atenton meritas minimume la rekomendo de prof. Frank: utiligi Esperanton kiel interlingvon en dokumentado. La prezento de Esperanto neniam impresis altrude; efektive, misia fervoro ĉi-foje estis rezervita al anglo, kiu, kiel lasta preleganto de la kongreso, klarigis sian projekton de cifera lingvo kiel interlingvo en aŭtomata tradukado.

Dudek tradukistoj kaj dokumentistoj estis tiagrade interesitaj, ke ili en la sola libera vespero sekvis inviton al speciala informvespero pri Esperanto en la hotelo "Holiday Inn". Tie la scienca argumentado de prof. Frank taŭge komplementis enkonduka kurseto

de Esperanto, tre sprite prezentita de pastro Hansjörg Kindler, la vicprezidanto de Luksemburga Esperanto-Asocio. En la lasta antaŭtagmezo de la kongreso estis rapide kolektitaj iom pli ol dudek subskriboj por la jena rezolucio:

La subskribintoj aŭdis... diversajn, parte kontraŭajn starpunktojn pri la taŭgeco de planlingvoj, precipe de la Internacia Lingvo (Esperanto).

Por ricevi praktikan bazon de prijuĝo (sed samtempe kiel almenaŭ simbola signo de ĝentileco al partoprenantoj, kies gepatra lingvo ne estis allasita kiel kongreslingvo) ni petas, ke en la venonta kongreso la Internacia Lingvo estu akceptita kiel kvara kongresa lingvo.

La peto estis voĉlegita dum la fina sesio. Ne okazis voĉdono (entute okazis, strange, nenia findiskuto), sed kredeble la rezolucio eniros la protokolon.

Neniu povis atendi de la kongreso proponojn pri barrompa solvo. Oni konstatis, ke ne ekzistas ĝenerala solvo por la diversaj, tre specialigitaj bezonoj kaj, ke ĉiuokaze aŭtomata tradukilo neniam povos anstataŭi la homon. Post la starigo de EURONET daŭros la diskuto de terminologoj, lingvistoj, tradukistoj kaj komputilaj fakuloj pri elireblecoj el la lingva embaraso..

Feliĉe pasis la tempo, kiam fervoraj adeptoj de Esperanto antaŭ tiaj forumoj per surprizatako ofertis sian lingvon kiel panaceon. Sed same pasis la tempo, kiam sciencistoj reagis ŝultroleve, eĉ nur aŭdante la la vorton Esperanto: Tia

reago ne plu eblas, kiam samfakuloj apogas siajn argumentojn por Esperanto per solida prezento de la rezultoj de ĝisfunda esploro. La fina, konkluda sesio de la kongreso konfirmis, ankaŭ flanke de reprezentantoj de la Komisiono, ke ne eblas, se temas pri venkado de lingvaj baroj, simple

preteriri Esperanton, unu deklaris, ke oni, nelaste rigarde al la ekster-EK-aj kaj ekstereŭropaj landoj, "devos pensi pri neŭtrala interlingvo". Kaj tio estas jam konsiderinda atingo. Por pluevoluigi ĝin al sukceso, la fakuloj jam uzantaj Esperanton sendube intensigos sian kunlaboron post tiu ĉi kongreso, kaj espereble ilia rondo pli grandigos. Paralele kun tio necesas, ke interne de la Movado daŭru la sinadaptado al la bezonoj de fakuloj, ekz. sur la kampo de terminologio. La interesiĝo, la simpatio por Esperanto, kiu surprize oftas, kelkfoje estas io timiga, ĉar ni ne povas jam firme jesi la demandon, ĉu Esperanto estas plene servokapabla.

Ulrich Lins



Helmar Frank

Raporto de la Estraro

pri la agado dum la laborperiodo 1976/77

1. ENKONDUKO

Kuraĝigite per la reagoj al la pasintjara aperigo de la Raporto en la revuo, la Estraro decidis ankaŭ ĉi-foje fari la samon, des pli ke tio unuflanke certigas la maksimuman disvastiĝon de la teksto, kaj aliflanke ŝparas al la Asocio plurajn milojn da guldenoj. Respektante la dezirojn de tiu malplimulto de la membroj, kiu opinias, ke per ĉi tia aperigo de la Raporto oni fakte malgajnas unu numeron de la revuo, la Estraro decidis konsiderinde koncizigi la raportan tekston kaj tiel lasi lokon ne nur por ilustraĵoj, sed ankaŭ por sep "normalaj" revupaĝoj. La rezulto espereble efike respegulas la agadon de la Asocio dum la laborperiodo 1976/77, sed en konciza, interesa kaj legebla formo. Similan praktikon ni esperas sekvi ankaŭ en la estonto. La membroj (kaj ankaŭ ne-membroj), kiuj ne estas samtempe ricevantoj de la revuo, povas peti senpagan ekzempleron de ĉi tiu numero, kaj la Centra Oficejo volonte disponigos ĝin.

2. ĜENERALAĴOJ

(1) Statuto: La Komitato en Ateno malŝarĝis la ĝisnunan komisionon kaj komisiis al la Estraro ellabori novan projekton, konsiderante la rezultojn de la komisiona laboro.

(2) Honoraj membroj: Post la forpaso, frue en 1977, de s-ro Pál Balkányi (Hungario) kaj prof. Eugen Wüster (Aŭstrio), la nombro de honoraj membroj estas 15.

(3) Komitato: Pro la aliĝo de tri novaj landaj asocioj (LA) – v. ĉi-sube sub (6) – aldoniĝis tri pliaj komitatanoj A. La pli frue aliĝintaj LA de Islando kaj Luksemburgo nomis observantojn, sed forfalis el la listo tiu de la Malagasa Respubliko. Restas 52 komitatanoj A, 6 B, 14 C kaj 5 observantoj, entute 77.

(4) Estraro: Okazis plenaj estrarkunsidoj en aprilo kaj aŭgusto 1976 kaj en januaro kaj aprilo 1977.

(5) Komisionoj kaj komisiitoj: La Komitato malfondis la komisionon pri la Statuto sed fondis du novajn: pri la Elektoj 1977 kaj pri administrado de la nova Fondaĵo Tria Mondo. Estis nomitaj ankaŭ komisiitoj pri Sporto kaj pri Kultura Agado.

(6) Landaj kaj Fakaj Asocioj: La Komitato akceptis tri novajn aliĝintajn landajn asociojn: Centra Laborrondo Esperanto (GDR), Korea Esperanto-Asocio kaj Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko. Pro malaktiviĝo de Esperanto-Grupo de

Monako kaj Esperantista Asocio de Madagaskaro, la nombro de aliĝintaj LA altiĝis tamen nur de 34 al 35. Restis 3 aliĝintaj fakaj asocioj; nova kontrakto kun ILEI kreskigis la nombron de kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj al 20.

3. ADMINISTRADO

(1) Oficistoj: La nombro de salajrataj oficistoj en 1976 plue malkreskis (ekvivalento de 6 tuttagaj, kontraŭ 8 en 1975). En la unua kvarono de 1977 estis jam nur ekvivalento de 4½ oficistoj, sed la nombro poste iom rekreskis.

(2) Volontula Servo: Manko de konstanta organizanto malhelpis pli vastan evoluigon de la Servo, sed ĝi plue donis nepre necesan subtenon al la profesiaj oficistoj de la Centra Oficejo (CO). Ĉe la Libroservo, post la fino de la deĵorperiodo de Bruce Crisp (Kanado), servis Giulio Cappa (Italio). Stefan MacGill el Nov-Zelando fariĝis oficisto de la CO, en aprilo 1977, post unujara volontula deĵoro. En la CO helpis ankaŭ Sonoko Kuzume (Japanio) kaj Johano Hailu (Nederlando), krom diversaj mallongdaŭraj vizitantoj. Al la kreskanta listo de tiuj, kiuj hejme plenumadas taskojn por la CO, aldoniĝis ankaŭ s-ro Richard Hirsch (FR Germanio). Ian Jackson (Britio), krom helpi (de januaro ĝis oktobro 1976) kiel volontula sekretario de la prezidanto, heroe laboris en la UK en Ateno, kune kun taĉmento da diverslandaj voluntuloj. La Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo per grandanima subvencio ebligis al s-ro Jackson vojaĝi al la UK en Ateno. Estas daŭre serĉataj pliaj junaj kandidatoj por volontula servperiodo en la Centra Oficejo.

(3) Domo: Okazis plua granda progreso en la kompleta interna refarbado kaj tapetado.

(4) Membraro: La finaj ciferoj pri 1976 estas: Asociaj membroj 25 729; Individuaj membroj: 683 MJ, 4 066 MA, 974 DM, 21 HM, 1 HP, 31 J-MJ, 124 J-MA, 119 MA-K, t.e. entute 6 018 individuaj membroj (en 1975: 6 025). La sumo de ĉiuj membroj estis do 31 747 (en 1975: 32 033). Ekde la komenco de 1977 okazis simpligo de la membro-kaj kotizo-kategorioj.

(5) Delegita reto: Fine de 1976 estis 1 194 ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ekskluzive de vic-, fak- kaj junul-delegitoj). Estis nomitaj tri novaj ĉefdelegitoj: G. Grattapaglia (Brazilo), C. Dazzini (Italio) kaj B. Kolker (Soveta Unio).

(6) **Periodaĵoj:** La Jarlibro 1976 ampleksis 384 paĝojn kaj aperis komence de julio en 6 800 ekzempleroj. Pri la revuo Esperanto vidu la ĉapitron 6. Pri la revuo Kontakto (eldonkvanto 700) vd. ĉap. 11. Pri Esperanto-dokumentoj (eldonkvanto 500; abonantoj 123 en Esperanto, 53 en la angla) vd. ĉap. 13. Pri LMLP/LPLP (eldonkvanto 1100; abonantoj por la aktuala 6a volumo 399) vd. ĉap. 13. Pri UN kaj Ni (eldonkvanto 400; abonantoj 22) vd. ĉap. 9.

(7) **Eldona Fakoj:** Ne aperis novaj eldonaĵoj de UEA, sed en januaro 1977 estis decidite eldoni tri verkojn: *Plena analiza gramatiko* (Kalocsay-Waringhien), *Izolo* (Kalocsay) kaj *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* (Wells).

(8) **Libroservo:** Post la unua jaro (1975) de grand-skala vendado de Esperanto en perspektivo, la vendoj en 1976 revenis proksimume al la nivelo de 1974. La librolisto estas komplete reviziita kaj rekompostita por nova eldono, aperonta en 1977.

(9) **Abonservo:** Plue kreskis la perado de nepropraj periodaĵoj. Ekde novembro 1976 tiu servo ne plu donas makleradon al aliaj perantoj, tiel ke landaj abonperantoj estas nun instigitaj rekte mendi ĉe la koncernaj eldonejoj.

(10) **Grafikaj laboroj:** Krom por la Universalaj Kongresoj kaj por siaj propraj eldonaĵoj, la CO plenumis grafikajn laborojn ankaŭ i.a. por TK/Stafeto. La ekfunkcio de la grafika centro en Antverpeno ebligis enspezi ankaŭ pro mendoj de belgaj instancoj, kvankam dum 1976 ĉefe okupis ĝin laboroj de UEA.

(11) **Varbado:** En la membrovarba konkurso, kiu finiĝis en aprilo 1976, estis premiitaj la kluboj en Tampere (Finnlando) kaj Groningen (Nederlando). Estas antaŭvidita nova, alispeca konkurso en 1977-1978.

(12) **Landaj oficejoj:** La kotizperadon transprenis por Greklando Helena Esperanto-Asocio. Por Korea Respubliko ekfunkciis kiel peranto Korea Esperanto-Asocio. UEA havas nun 39 landajn oficejojn (kotizperantojn).

(13) **Societo Zamenhof:** Krom honoraj membroj k.a., Societo Zamenhof en 1976 havis 221 kotizantajn membrojn — kresko de preskaŭ 30 % kompare kun 1975. Kiel ankaŭ pasintjare, dum la UK en Ateno la prezidanto faris specialan akcepton por la membroj de Societo Zamenhof, kiuj dum la jaro ricevadas specialajn cirkulerojn pri la evoluo de la laboroj kaj agado de la Asocio.

(14) **Poŝtmarkvendado:** Ĝi ne donis grandajn rezultojn en 1976, sed estas esplorataj pliaj manieroj por profite forvendi la kreskantajn stokojn.

4. FINANCOJ

A. FINANCA PROGRAMO

Kvankam la unuaj kontribuoj envenis jam en 1975, la grandaj sumoj atingis la CO en 1976. Bona bazo por la Financa Programo nun ekzistas kaj en la bilanco je la fino de la jaro 1976 aperas la tiurilata sumo de

53 000,- gld. Detaloj pri la Programo estas troveblaj en la junia numero de *Esperanto* kaj en la Estrara Raporto 1975 - 76. Dum la UK en Ateno, la Komitato aprobis la bazajn laborkampojn de la Programo, kaj la dokumentada kaj esplora laboro povis do komenci. Ĉefa bremsilo estis manko de homaj fortoj. UEA eldonis 64-paĝan konsilaron *Financa evoluigo* en la serio Konsilaroj pri Esperanto-Agado (n-ro 4), kiun verkis H. Tonkin. Ĝiaj preskriboj estas nun aplikotaj en la disvolvo de la Programo.

B. KONTO DE KOSTOJ KAJ RIMEDOJ

(1) **Ĝeneralaj rimarkoj:** Post la bona financa rezulto de la jaro 1975, ni povas denove publikigi konton de kostoj kaj rimedoj pri 1976 kun pozitiva saldo de 27 000,- gld. Ni danku pro tiu rezulto unuavice al tiuj, kiuj sukcesplene plenumis la laboron en la CO (oficistaro kaj volontuloj), plue la subtenantoj (donacintoj kaj membraro de Societo Zamenhof), la aĉetintoj de libroj, la kotizperantoj kaj ne laste ĉiuj membroj, kiuj kune formas UEA.

(2) **Buĝeto kaj fina rezulto:** La buĝeto aprobita en la kunsido de la Komitato en 1975 antaŭvidis egalajn sumojn de kostoj kaj rimedoj de po 327 350 gld. La fina rezulto montras kostojn de 334 000 gld., tio estas 6 650 gld. pli. Sed la rimedoj atingis 360 500 gld., do 33 150 gld. pli. Tiel rezultis profito de 26 500 gld. (ĉiuj ciferoj estas rondigitaj).

(3) **Kostoj, kompare kun buĝetitaj sumoj:** Malpli altaj, ol buĝetitaj, estis la elspezoj por laborfortoj en la CO, entute 11 000 gld. (nome 15 000 gld. malpli



La 61a UK en Ateno: Streĉa organiza laboro rezultigis ĝuindan kaj ankaŭ finance tre sukcesan kongreson.

por salajroj kaj 4 000 gld. pli por rekompencoj al volontuloj). Krome, la jarlibro kostis 4 000 gld. malpli ol antaŭvidite. La plej gravaj pli altaj elspezoj estis : fotokopiado 3 000, revuo 7 000, vojaĝ- kaj restadkostoj 5 000 kaj ĝeneralaj kostoj 3 000 gld.

(4) Rimedoj, kompare kun buĝetitaj sumoj: Ĝojige estas konstati, ke preskaŭ ĉiuj eroj enspezis pli ol buĝetite : kotizoj 6 000, libroservo 6 000, grafika laboro 5 000, kongreso 5 000 kaj rento 6 500 gld. pli. Aparte substrekindaj estas la pli altaj enspezoj el kotizoj.

C. BILANCO JE 1976 12 31

(1) Monrimedoj: La monrimedoj atingis sumon de 193 000 gld. Al tio grave kontribuis la sumoj ricevitaĵoj por la Financa Programo kaj la profito 1976. Cetere, estas normale, ke, pro jam ricevitaĵoj kotizoj por la nova jaro kaj por la estonta UK, en la fino de iu jaro la monrimedoj estas altaj. (Komence de 1977 parto de la monrimedoj estis investita en valorpaperoj.

(2) Fondaĵoj: Krom la aparta fondaĵo "Financa Programo" (vidu supre), la diversaj fondaĵoj kreskis per 32 000 gld. Agrabla estis la kresko de la "Fondaĵo TEJO" pro la (ankaŭ finance) sukcesa kongreso en Tesaloniko. Estas starigita aparta konto por "Premio Raymond Schwartz", kaj la "Fondaĵo Oficeja Ilaro" nun enhavas 5 200 gld., pro bela donaco de 5 000 gld. fare de anonimulo.

(3) Asocia kapitalo: La ero Dumvivaj Membroj (DM) nur iom kreskis pro aliĝo de kelkaj novaj DM. La cetera kapitalo kreskis pro la profito kaj tiel la tuta Asocia Kapitalo fariĝis 336 000 gld. Resume, la Asocia Kapitalo, plus fondaĵoj, sumis je 478 000 fine de la jaro 1976 (kompare kun 347 000 fine de 1975).

Ĉ. FINA RIMARKO

En komparo kun la situacio antaŭ kelkaj jaroj, la nuna financa situacio de UEA estas kuraĝiga. Ni ĉiuj, tamen, estu daŭre konsciaj, ke, kompare kun la ankoraŭ farota laboro, la financaj rimedoj de UEA estas nur modestaj. Plia fortikigo de la financa situacio en la kadro de la Financa Programo estas ĉiel alstrebenda. Sed, ni konsciu ankaŭ, ke mono sola ne povas alproksimigi nian celon! Tiurilate restas plue necesegaj kapablaj homaj fortoj kaj entuziasmo de ĉiu unuopa membro de UEA.

5. INSTITUCIO HODLER '68

Dum la jaro 1976, la estraro de la Institucio plue konsistis el: s-ro G. Maertens (Belgio), prezidanto, d-ro W. Bormann (FR Germanio) kaj s-ro E. Haver-Schmidt (Nederlando). Krome, en sia kunsido en aprilo 1976, la Estraro de UEA nomis du pliajn estraranojn: s-ro E.L.M. Wensing (Belgio) kaj s-ro E.J. Woessink (Nederlando). F-ino M.H. Vermaas (Nederlando) plue funkciis kiel administranto de la Institucio. En la jarkunveno, okazinta la 22an de majo 1976 en Hago, la estraro decidis asigni subvenciojn ĝis la sumo

de entute 8 000,00 guldenoj, laŭ jena divido: Fondaĵo Canuto 3 000,00; Akademio de Esperanto 1 000,00; Kanada Esperanto-Asocio 1 000,00; Projekto Corsetti (lernolibroj por la Tria Mondo) 1 000,00; Someraj Universitataj Kursoj 700,00; Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj 500,00; Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO 500,00 kaj Portugala Esperanto-Asocio 300,00 gld. En la sama kunveno, la administranto anoncis sian definitivan retiriĝon el tiu funkcio je la fino de 1976, kun promeso ankoraŭ fintrakti kurantajn aferojn en la unuaj monatoj de 1977. Intertempe la estraro trovis novan administranton, s-ro J.P. Lok (Nederlando).

La financa raporto montris sanan staton de la Kapitalo Hodler '68. Ĝi estas, kiel pli frue, investita en akcioj, obligacioj, hipoteke kaj loĝdomo.

6. REVUO

(1) Redaktoro: Simo Milojević.

(2) Amplekso kaj enhavo: Spite al antaŭviditaĵoj, la amplekso de la jarkolekto 1976 restis sama, kiel en 1975, i.a. dank' al kreskantaj anonco-enspezoj. Kun la maja n-ro 1976 aperis enketilo pri la preferoj de la legantoj. La marta kaj junia n-roj, respektive, estis dediĉitaj al K.Kalocsay kaj al la Financa Programo, dum la tutan numeron julio-aŭgustan okupis la Estrara Raporto, kiu antaŭe aperadis en la Jarlibro aŭ aparte.

(3) Teknika prizorgo: La kompostadon plenumis plejparte volontuloj en la CO kaj en Antverpeno. La CO ankaŭ enpaĝigis kaj fotografis. Presis la firmo Tuijtel, Nederlando.

(4) Eldonkvanto: La eldonkvanto variis inter 7900 kaj 9100 ekz. Krom ĉirkaŭ 150 simplaj abonoj (sen membreco) estis en 1976 ankaŭ 1 500 kolektivaj abonoj — kaj tiu nombro kreskis en 1977 ĝis 2 600, sendataj al Belgio, Bulgario, FR Germanio, Islando, Malto kaj Pollando.

(5) Aperdato: La akurateco de la aperado estis rekaptita en julio 1976, kaj dum la raporta jaro la meza aperdato estis la 6-a de la koncerna monato.

7. KONGRESOJ

(1) 61a UK en Ateno: La 61a Universala Kongreso de Esperanto okazis en la greka ĉefurbo Ateno de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1976, sub la alta protektado de prof. K.A. Tripanis, ministro pri kulturo kaj sciencoj. La kongreson partoprenis 1266 personoj el 51 landoj. Ĝin prezidis d-ro H. Tonkin, prezidanto de UEA; la prezidanto de LKK estis s-ro G.Miggas. Kiel kongresejo servis la Altlernejo Pantios kaj la atena Hotelo Hilton (por solenaj aranĝoj).

La inaŭguro de la kongreso okazis, same kiel pasintjare, en du partoj: antaŭtagmeze, en la ĉeesto de 13 registaraj reprezentantoj, oni havis la oficialan inaŭguron, kiun ĉeestis ankaŭ la vicministro pri komerco, direktoro de la Ministerio de civilizo kaj la ĉefurbestro de Ateno; posttagmeze okazis la malfermo

de la kongreso, kiun prezidis d-ro W. Bormann. En la Unua Ĝenerala Kunsido oni traktis, kiel kutime, la Raporton de la Estraro pri la agado de UEA dum 1975/76. Dum la Dua Ĝenerala Kunsido estis pritraktita la kongresa ĉeftemo "Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo".

La 61a UK certigis al la partoprenantoj aparte riĉan kulturen programon (v. la septembran n-ron de la revuo).

En Ateno la Komitato de UEA kunsidis sepfoje. Dum la fruktodonaj diskutoj oni traktis i.a. la Financan Programon de la Esperanto-Movado kaj projekton de nova Statuto.

(2) TEJO-Kongreso: La 32a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazis de la 24a ĝis la 31a de julio 1976 en Tesaloniko. Vidu raporton de TEJO (ĉap. 11).

(3) UK en Islando: Laŭ decido de la Estraro de UEA, la 62a UK okazos en la islanda ĉefurbo Rejkjaviko, de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1977. Prezidanto de LKK estas s-ro B. Ragnarsson.

(4) UK en Varna: En la jaro 1978, laŭ invito de Bulgara Esperantista Asocio, la 63a UK okazos en la bulgara universitata urbo Varna.

(5) UK en Svislando: La Estraro de UEA dum sia kunsido en januaro 1977 decidis, ke la 64a UK en 1979 okazu en Lucerno (Svislando). Krome, oni notis interesigon inviti postajn UK (Svedio, Brazilo, Italio).

8. INFORMADO

(1) Ĝeneralaj informoj: Dum la 60a UK la Komitato pliampleksigis la konsiston de la Komisiono pri informado, al kiu estis elektitaj kiel membroj s-roj T. Boersma, G. Conrad, L. Kosieniak, B. Leonov, F. Luin, H. Melasniemi, A. Pettyn kaj S. Świstak. En Ateno, la Komitato reelektis la komisionon en la sama konsisto, krom s-ro T. Boersma, kiu retiriĝis.

Tre efike laboris Pola Radio, kiu al la esperantista aŭskultantaro dissendis freŝajn kaj abundajn informojn pri Esperanto kaj la E-movado. Aparte substrekindas la laboro de s-ro L. Pickel, kies *Pilo-Press* estas plue vaste utiligata kiel konstanta fonto de freŝdataj, kvankam ne ĉiam plej trafe elektitaj novaĵoj kaj informoj. Gravan kontribuon al la informado pri la Internacia Lingvo kaj la E-movado donis *Esperanto-dokumentoj*, pri kio v. la ĉapitron 13. UEA eldonis en 4000 ekzempleroj novan nederlandan tradukon de la plej konata CED-dokumento *Bazaj faktoj pri la Internacia Lingvo* de prof. I. Lapenna. Entute ĝi aperis ĝis nun en 17 eldonoj en 13 lingvoj.

(2) Landaj informaj fakoj: Laŭ la informoj kaj publikigitaj rezultoj, landaj asocioj kaj ties informaj fakoj notis novajn sukcesojn en la informa laboro. Jen mal-longaj telegrafstilaj sciindaĵoj: En la ĉefa ĉeĥoslovaka ĵurnalo *Rude právo* aperis la 31an de julio 1976 artikolo (700-vorta) de O. Kníchal, "Pri la lingvo de estonto". La 21an de oktobro 1976, dum junulara programo, la ĉeĥoslovaka televido elsendis 10-minutan intervjuon

pri la Internacia Lingvo. Televidaj elsendoj pri Esperanto okazis ankaŭ en Italio kaj Jugoslavio (plurfoje), Francio, Greklando, Bulgario, Brazilo kaj Nederlando. Okazis ankaŭ pluraj radio-elsendoj pri Esperanto, ekz. prof. C. Støp-Bowitz havis 20-minutan intervjuon en la norvega radio, komence de 1977. Germana Esperanto-Asocio eldonis novan kvarpaĝan propagandilon pri Esperanto (40 000 ekzempleroj). Aperis, plume de R. Schulz, ampleksa 215-paĝa populara enkonduko al Esperanto por germanlingvanoj, *Mein geliebtes Esperanto*. UFE aperigis 40-paĝan franclingvan informilon de Gabriel Rougetet, *Une langue internationale commune à toutes les nations du monde*. En Japanio ekaperis (en 1975) monata nacilingva informilo *La mondo de Esperanto*, kiu ankaŭ en 1976 daŭrigis utilan rolon en la informado de neesperantista publiko. Krome, en Japanio oni lastatempe eldonis aŭ reeldonis plurajn nacilingvajn librojn pri Esperanto aŭ esperantistoj; kelkaj el tiuj libroj aperis en tre prestiĝaj libroserioj en plurmila eldonkvanto.

La revuoj de la landaj asocioj en Italio kaj Svedio regule aperigas parton de sia enhavo en la nacia lingvo, kio ludas gravan informan rolon. Fine de januaro kaj komence de februaro 1977, *Vjesnik*, la ĉefĵurnalo de Kroatio (Jugoslavio), aperigis en siaj kvin numeroj la felietonon de Spomenka Štimec, "Internacia lingvo, kial kaj kiel?". Pro la amplekso de la teksto (ĉ. 4500 vortoj) kaj pro la prestiĝo de la ĵurnalo, oni povas aserti, ke tio ĉi estas unu el la plej sukcesaj priesperantaj informaj paŝoj faritaj en Jugoslavio. En kunsido, la 4an de decembro 1976, Belga Esperanto-Federacio kaj Nederlanda Esperanto-Centro interkonsentis estonte kunlabori sur la kampo de informado. Rezulte de tiu interkonsento, la nederlandlingva eldonaĵo *Esperanto-panorama* estonte celos ne nur la nederlandlingvan parton de Belgio, sed ankaŭ Nederlandon mem.

Dum la 29a Tutpollanda E-Kongreso, en oktobro 1976, PEA dediĉis specialan atenton al la informado. Pro tio pluraj regionaj kaj centraj ĵurnaloj skribis pri la kongreso kaj vaste informis pri Esperanto (10 artikoloj, informoj kaj intervjuoj en preskaŭ 1-miliona gazetara eldonkvanto; kelkfoje en landa programo de la radio kaj televido). La grandformata ilustrita monata magazino *Soveta Unio* aperigis en aŭgusto 1976 ampleksan intervjuon kun la soveta lingvisto, d-ro M.I. Isaev. La publikigo de tiu intervjuo estas unu el la plej bonaj informaj paŝoj faritaj en la ĝisnuna historio de la E-movado. La 60-paĝa kolore ilustrita magazino aperas en 19 lingvoj kaj atingas plurmilongan eldonkvanton. La tekston de la intervjuo transprenis pluraj nacilingvaj kaj Esperantaj periodaĵoj. Dum 1976 aperis en iranaj periodaĵoj deko da ampleksaj artikoloj pri Esperanto kaj la lingva problemo, kaj 20-paĝa studo de d-ro M.H. Saheb-Zamani. La Universitato de Teherano publikigis lian 36-paĝan broŝuron *La kulturo kaj la revolucia lingvo*.

(3) Laboro de la Komisiono pri informado: La komisiono kunsidis en Ateno kaj ellaboris raporton aprobitan de la Komitato. Aperis konsilaro *Argumentado*



La irana ĉefurbo Teherano: Ankaŭ la Esperanta "trafiko" en tiu lando viciĝis inter la plej viglajn dum la lastaj jaroj.

por *Esperanto*. La dua ĉeftemo de la atena UK — "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto" — traktis la arton de efika pledado por la Internacia Lingvo. Estas preĝigataj du konsilaroj pri: sciencteknika informado (B. Leonov) kaj informa materialo kiun landaj asocioj povos uzi (U. kaj F. Luin). S-ro G. Conrad prilaboris la libron *Dua manlibro de varbado*.

(4) Informa laboro de TEJO: Vidu la ĉap. 11.

(5) Informado pri la Universalaj Kongresoj: Ateno 1976: En pluraj grekaj gazetoj dum la jaro aperis artikoloj. Kelkfoje la greka televido elsendis intervjuojn aŭ informojn antaŭ kaj dum la Kongreso. Okazis gazetaraj konferencoj por eksterlandaj ĵurnalistoj kaj raportistoj de la ŝtata televido kaj kelkaj grekaj ĵurnaloj. Rejkjaviko 1977: Krom la aperigo de la islanda eldono de la konata seslingva faldfolio kaj produkto de kelkaj gazetaraj bultenoj, kiujn la islandaj ĵurnaloj abunde ekspluatis, oni aranĝis televidan kaj plurajn tre ampleksajn intervjuojn en preskaŭ ĉiuj gravaj islandaj gazetoj (en aprilo, septembro kaj oktobro 1976). Se juĝi laŭ la ĝisnunaj atingoj, la 62a UK en Islando montriĝos modele utiligita okazo por informi la ĝeneralan publikon pri la Internacia Lingvo.

9. EKSTERAJ RILATOJ

A. INTERNACIAJ REGISTARAJ ORGANIZOJ

(1) Unesko: UEA ludis tre aktivan rolon en la laboro de Unesko, sendante al ĝi detalajn komentariojn pri ĝia Mezperspektiva Plano 1977-82 (precipe pri la rolo de lingvaj demandoj en tiu plano) kaj pri aliaj bazaj dokumentoj, partoprenante ĝiajn kunvenojn, kaj fariĝante unu el la plej aktivaj asocioj inter la grupo de neregistaraj organizoj (NROj). Sub gvido de s-ro E.

Chicot, laborgrupo pri Unesko en Parizo kunsidis ĉiumonate por plani sian agadon, prizorgis reprezentigon de UEA en ĉiuj ĉefaj aranĝoj, kaj intervenis pri aferoj, kiuj tuŝis la lingvan demandon. UEA aktive kunlaboris en la organizo de simpozioj de la NROj. En decembro, tripersona delegacio de UEA partoprenis la Simpozion pri la Kontribuo de NROj al Starigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo kaj havis okazon atentigi pri la lingvodiverseco kiel elemento en la ekonomia subevoluo kaj en la informado. La laborgrupo nun partoprenas la preparkunsidojn por la Simpozio pri Malarmado kaj Porpaca Edukado. S-ino B. Despiney partoprenis la Kolektivan Konsultigon de Junularaj Organizoj kaj intervenis pri Esperanto. Re-prezentis UEA en la 19a sesio de la Ĝenerala Konferenco, en Nairobi, d-ro R.G. Robbins.

Jam la duan fojon la Ĝenerala Direktoro sendis publikan mesaĝon al UK, ĉi-foje emfazante ne nur la naturajn ligojn inter Unesko kaj UEA sed ankaŭ sian esperon "ke tiuj rilatoj plue plifortiĝos en la venontaj jaroj." En sia dua Kongresa Rezolucio, la UK gratulis Uneskon pro la 30a datreveno de ties fondiĝo, kaj tiutema artikolo aperis en la novembra numero de la revuo. Dise tra la Esperanta gazetaro aperis similaj artikoloj, dank'al atentiga cirkulero de UEA. UEA ankaŭ faris tradukon de la baza dokumento pri la Projekto de Unesko pri Asociiĝintaj Lernejoj, por distribuo al lernejoj.

Pluraj landaj asocioj havas regulan kontakton kun siaj naciaj Unesko-komisionoj. Laŭ esploro en 1976, montriĝis, ke tiuj kontaktoj estas plej fruktodonaj en Bulgario, Hungario, Japanio, kaj Jugoslavio. Ankaŭ en Luksemburgio, FR Germanio, Svislando, Aŭstrio, Islando, Kolombio, Nov-Zelando kaj aliaj landoj la kontaktoj estas oftaj, kio faciligas la laboron de UEA ĉe la centraj instancoj.

Inter la diversaj temoj, kiujn Unesko studos en la kadro de sia Mezperspektiva Plano, estas la rajto je komunikado. Kontribue al tiu studo, UEA elektis kiel ĉeftemon de la 62a UK "La rajto je komunikado".

(2) Unuiĝintaj Nacioj kaj ties instancoj: La Oficejo de UN pri Publika Informado aperigis duan eldonon de la Esperanta traduko de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Tiu oficiala rekono de Esperanto (la unua eldono aperis ĉe UEA), eĉ se nur modesta, estas bona komenco. La tradukon oni oficiale sendis al ĉiuj 145 nacioj-anoj de UN. La ĉiusemajnajn kunsidojn de la NROj ligitaj al la Ekonomia kaj Socia Konsilio regule ĉeestas reprezentantoj de UEA, s-ro Mark Starr kaj s-ino Marion Newell Lurie. S-ro Starr ankaŭ liveras informojn pri la laboro de UN al anoj de UEA, kiuj tiucele kontaktas lin. Konstanta montrorŝranko pri Esperanto troviĝas en unu el la ĉefaj eniraj haloj de la sekretariata domo, en klare videbla loko. Regula interveno de ambasadoro Ralph Harry (Aŭstralio), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, kaj de aliaj Esperanto-parolantaj funkciuloj de UN plifortigas la konscion de la Organizo pri

Esperanto kaj ĝiaj celoj. Reprezentanto de la regiona Informcentro de UN partoprenis la inaŭguron de la UK. La jaro 1976 estis proklamita de UN la jaro 'Habitat', la jaro pri la homa loĝmedio. Speciala kunsido pri tiu temo okazis dum la UK, kun partopreno de arkitektoj, inĝenieroj ktp., sub prezido de s-ro A. Diaz; raporton oni sendis al la koncerna instanco de UN. Krome, UEA raportis pri sia kontribuo al la Jardeko kontraŭ Rasismo kaj Rasa Diskriminacio, kaj aperigis en la serio *Esperanto-dokumentoj* finan raporton pri sia agado okaze de la Internacia Jaro de la Virino (redaktis s-ino E. Bormann). La Komisiono de UEA pri Virina Agado daŭrigis sian laboron, nun en la kadro de la Jardeko de la Virino. Virinaj kunsidoj okazis en la UK, kun partopreno de neesperantistaj aktivuloj en la virina movado. Du novaj anoj elektiĝis al la komisiono: s-ino H. Kesälä kaj s-ino J. Tonkin.

Plurfoje aperis la bulteneto *UN kaj Ni*, sub redakto de s-ino A. Woessink-Nagata. La bulteno raportadas pri la laboro de UEA ĉe la diversaj instancoj de UN kaj donas aliajn utilajn informojn. Dum la jaro okazis sporadaj kontaktoj kun la Monda Organizo pri Sano, kaj kun la Universitato de UN. La Asocio nun komencas aktivan laboron por atentigi la Universitaton (kiu estas sendependa instanco de UN) pri la neceso esplori la lingvan problemon en la kunteksto de la ekonomia evoluo kaj la kultura pluralismo. S-ro E.J. Woessink, estrarano de UEA, vizitis la sidejon de la Universitato en Tokio en junio por interparolo kun la vicrektoro.

(3) Regionaj Organizoj: La ĉefa temo de la 61a UK estis la regiona kunlaboro inter ŝtatoj. Do estas nature, ke en 1976-77 la regionaj organizoj ricevas apartan atenton. La Eŭropa Komisiono sendis oficialan reprezentanton al la UK (neniam antaŭe tio okazis) kaj salutmesaĝoj venis de la Organizo de Afrika Unueco, Organizo de Amerikaj Ŝtatoj, Prezidanto de la Eŭropa Parlamento, kaj Ligo de Arabaj Ŝtatoj. Unu el la temoj traktitaj en la UK estis la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, pri kies utiligo UEA jam aperigis konsilaron (n-ro 2). Ĝia kompleta teksto aperis en Esperanta traduko, en Bratislava, Ĉeĥoslovakio.

La reprezentanto de la Asocio ĉe la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj, s-ro Correa, lastatempe informis ĉiujn delegaciojn pri la laboro de UEA kaj potencialo de Esperanto.


Kvankam la agado ĉe la Eŭropa Komunumaro (EK) evoluas esence sendepende de UEA, la Asocio estas tre proksime ligita al ĝi. Eŭropa Esperanto-Centro (EEC) daŭrigas sian agadon, kaj la laborgrupo en Bruselo (kiu konsistas el personoj profesie ligitaj al la EK) funkcias kiel konsilantaro al EEC kaj UEA. La laborgrupo planis sian estontan agadon dum kunsido kun la prezidanto de UEA en januaro. La prezidanto ankaŭ vizitis specialan kunsidon pri agado por Esperanto inter eŭropaj instancoj, en Luksemburgo sammonate. En februaro la prezidanto de EEC, nia estrarano d-ro P. Denoël, vizitis la sidejon de la Eŭropa Komisiono en Bruselo por interparolo kun la estro de

ties informa fako. Ĝenerale estas sentebla plifirmiĝo de la rilatoj kun la eŭropaj instancoj.

Laŭ rekomendo de la Komitato, s-ro Leon-Smith okupiĝas pri starigo de eŭropa E-asocio, federacio de landaj asocioj en la EK, kiu povu reprezenti la interesojn de la Internacia Lingvo ĉe la koncernaj instancoj.

B. INTERNACIAJ NEREGISTARAJ ORGANIZOJ

Kelkaj aliĝintaj kaj kunlaborantaj fakaj asocioj de UEA havas senperajn ligojn kun la ĉefaj internaciaj organizoj en siaj fakoj. Menciindaj estas la kunlaboro inter ISAE (sciencistoj) kaj la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj (vidu la revuon, aprilo 1976; aprilo 1977), el kiu rezultis la Esperanta eldono de *Scienca Mondo*; la ligoj inter KELI (kristanoj) kaj la Monda Konsilio de Eklezioj, kies laborgrupo pri lingvo-politiko montriĝis escepte sentema al la problemoj de la lingva diskriminacio; kaj la kontaktoj inter SEL



(skoltoj) kaj la mondaj organizoj pri skoltoj kaj skoltinoj, kiuj helpas en la distribuado de la eldonaĵoj de SEL. Ankaŭ ILEI (instruistoj), kunlaboranta asocio, komune kun la Asocio de Eŭropaj Instruistoj esploras en aparta komisiono la utiligon de Esperanto en la instruado. UEA havas rilatojn kun pluraj aliaj fakaj asocioj kaj partoprenas ilian laboron.

Kun Sennacieca Asocio Tutmonda la kontaktoj daŭras. UEA estis reprezentita en la SAT-Kongreso, kaj SAT sendis salutmesaĝon al la 61a UK.

Sur la kampo de sindikataj organizoj okazis signifa progreso, precipe en Britio, kie oni en januaro 1977 fondis sindikatan kaj kooperativan Esperanto-grupon. Oni esperas iom post iom internaciigi tiun ĉi agadon per fondo de similaj organizoj en aliaj landoj.

D-ro G. Polerani (Italio), komisiito de UEA pri sporto, nun komencas evoluigi sian agadon, kiu celas esplorojn pri la efektiva lingva situacio en tiu medio, kontaktadon kun sportaj organizoj kaj aktivan intervenon en kelkaj elektitaj sportaj eventoj. Dank'al bona preparlaboro de kanadaj esperantistoj, la frazlibreto *Saluton, amiko* estis distribuita al ĉiu partoprenonto de la Olimpiko en Montrealo. Krome, oni serioze okupiĝas pri plurlingva sporta terminaro kun difinoj en Esperanto (v. la revuon, aprilo 1977).

C. REGISTAROJ KAJ NACIA AGADO

La agado en politikaj partioj kontentige evoluas en kelkaj landoj, precipe en socialistaj medioj, pri kiuj okupiĝas d-ro A. Menabene (Italio). Aparta kunsido pri ĉi tiu agado okazis dum la UK en Ateno.

Dank'al efika laboro de s-ro Leon-Smith, la kunordigo de la parlamenta agado en la diversaj landoj komencas alporti rezultojn. La brita parlamenta grupo nun havas 55 membrojn. En Francio, 223 deputitoj apogas leĝproponon pri la instruado de Esperanto. Propono, starigi en la hungara parlamento komisionon por esplori la celadon de Esperanto, ĝis nun rikoltis subtenon de 140 parlamentanoj. Aktiva parlamenta agado okazas en pluraj aliaj landoj, inkluzive Italion, Brazilon kaj Greklandon.

UEA eldonas bultenon, *Esperanto-Kuriero Parlamenta*, sub redakto de s-ro David Curtis (Britio), por ligi la aktivulojn pri parlamenta agado en la diversaj landoj. En 28 landoj estas nun komisiitoj pri parlamenta



La Hungara Parlamento ĉe Danubo en Budapeŝto: Laŭ nemultaj detaloj konataj, tie nun okazas unu el la plej interesaj provoj firmigi la socian pozicion de la Internacia Lingvo. Malantaŭ propono favora al Esperanto staras 140 hungaraj parlamentanoj (40% de la tuta deputitaro).

agado. Oni baldaŭ lanĉos inter-parlamentan Esperanto-grupon, kiu kunigos la parlamentanojn de la diversaj landoj, kiuj favoras Esperanton. Speciala kunsido dum la 61a UK traktis la parlamentan agadon.

Kontaktoj inter membroj de UEA kaj plej diversaj naciaj neregistaraj organizoj estas tre abundaj. Menciinda tiurilate estas Usono, kie seminario pri Esperanto regule okazas en la jarkongreso de la Asocio pri Modernaj Lingvoj, kaj kie sesio de la Asocio pri Internaciaj Studoj estis ĉi-jare dediĉita al lingvaj problemoj, kun partopreno i.a. de la prezidanto de UEA, la direktoro de la CO, la redaktoro de la revuo *LPLP* kaj la aganta direktoro de CED. Bonaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj karakterizas la Esperanto-movadon interalie en Japanio, Hungario kaj Kolombio.

10. KULTURO

La Esperanto-kulturo en 1976-77 montris plurajn signojn de revigliĝo. Eldona aktiveco en kelkaj landoj — Britio, Danlando, Japanio — fariĝis vere intensa, kaj plia intensiĝo estas antaŭvidebla; vigliĝis la vizitado al kulturaj aranĝoj i.a. en kongresoj kaj renkontiĝoj; daŭre kreskadis serioza, scienca interesiĝo pri Esperanto. Ankaŭ UEA, kiel ĉefa gvida instanco de la ĝenerala Esperanto-kulturo, partoprenis tiun novan

aktiviĝon. Aldone al la estrarano pri kulturo (d-ro H. Tonkin), s-ro A. De'Giorgi kaj d-ro C. Minnaja estis nomitaj komisiitoj pri kulturo, kaj d-ro U. Lins daŭrigis sian valoran agadon kiel komisiito pri eldona agado.

(1) Eldonaĵoj: La Estraro definitive decidis eldoni la verkon *Plena analiza gramatiko* de Kalocsay kaj Waringhien kaj la poemaron de Kalocsay *Izolo*. (v. ĉap. 3 (7) de ĉi tiu raporto).

(2) Internacia Somera Universitato: La 29a sesio, en la kadro de la 61a UK, konsistis el prelegoj kaj seminarioj. Sed ĉi-jare aldoniĝis ankaŭ plursesia seminario pri Esperanto kaj lingvistiko sub gvido de d-ro J.C. Wells, lekciisto ĉe la Londona Universitato kaj konata esperantologo. Liaj prelegoj, kiuj estis multnombre vizitataj, baldaŭ aperos libroforme en eldono de CED. La rektoro de la ĉi-jara sesio estis prof. V. Peevski (Bulgario). Dek unu prelegantoj kontribuis al tiu ĉi aparte sukcesa sesio.

(3) Belartaj Konkursoj: Raporto, kun ĉiuj detaloj pri premiitoj, aperis en la septembra numero de la revuo. La konkursoj havis en 1976 unu novan branĉon, nome la premion Luigi Minnaja por originala eseo, kiun gajnis K. Piĉ (Ĉeĥoslovakio). Forfalis tamen la tradukaj branĉoj, pro malfacileco efike juĝi ilin, kaj kun espero, ke la anoj de la diversaj naciaj lingvoj organizos proprajn tradukajn konkursojn, eventuale sub aŭspicio de UEA. Jam la anglalingvanotio faris: UEA aŭspicias en 1977 la unuan "Anglalingvan Tradukan Konkurson" kaj la tradukan branĉon de la itala konkurso 'Larius'. La Belartajn Konkursojn de UEA gvidis samkonsista komisiono, kun aldonaj juĝantoj por la fota kaj esea branĉoj. En Ateno la Komitato de UEA akceptis novan regularon de la Konkursoj, kiu respegulas la ŝanĝojn de la pasintaj unu-du jaroj kaj faciligas la komisionan proceduron. La Estraro lastatempe signife plialtigis la monsumojn de la konkursaj premioj.

(4) Servoj: La Magnetofona Servo sub gvido de s-ro R. Eichholz (Kanado), travivis sukcesan jaron. La Koresponda Servo, gvidata de f-ino C. Hueter (Francio), estis uzata proksimume same multe kiel pasintjare. Pri la Lingva Servo aperis artikolo en la januara numero de la revuo. S-ro H. Thien daŭre funkciigas sian Fotoservon pri Zamenhof, kiu disponas pri proksimume 250 diversaj fotoj kaj diapozitivoj. Adresoj de la servoj de UEA aperas en la Jarlibro.

(5) Komisioj: La Estraro nomis novan sekretarion de la komisiono pri la Internacia Ekzameno, nome s-ron William Auld (Skotlando), kun komisio pri funda revizio de la ekzameno. Similajn reformojn oni ankoraŭ iniciatas ĉe la Kontrolkomisiono pri Lernolibroj. S-ino Eliza Kehlet (Danlando) estis nomita kunlaboranto pri la familia uzo de Esperanto, por kunordigi servojn por familioj kun denaskaj esperantistoj. Dank'al nova konsilaro pri la Semajno de Internacia Amikeco, kaj disanoncado de la Semajno en la revuo, SIA en 1977 havis pli signifajn rezultojn ĉe la publiko kaj ene de la Esperanto-movado ol en antaŭaj

jaroj. Gvidis la agadon la iniciatinto de la Semajno, s-ro E. Carlén (Svedio).

(6) Aliaj Aktivecoj: La aldono de novaj kunlaborantoj ebligis kaj ebligis vastigitan agadon sur la kampo de kulturo. UEA donis sian aktivan subtenon al la utiligo de Esperanto en pupteatroj; ĝi esploras la liveradon de praktika organiza helpo al la esperantistaj muzikistoj; ĝi aktive apogas radioprogramojn en Esperanto, kaj ĝi antaŭvidas starigon dum 1977 de konsilantaro pri la Esperanto-kulturo.

11. JUNULARA SEKCIO

(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

(1) La Estraro kaj Komitato: La Estraro, elektita dum la IJK en Tesaloniko, konsistas el dek unu membroj; kvin estraranoj estas tio unuafoje. La Estraro kunsidis dum la IJK en Tesaloniko, dum la UK en Ateno kaj dum la vintra IS en Zenzenŝtajn (FR Germanio) kaj tenis daŭrajn kontaktojn personajn kaj korespondajn. Elektita por du jaroj en 1976, la Komitato nun ampleksas 40 personojn. Ĝi kunsidis dum la kongreso en Tesaloniko.

(2) La Individua Membraro: En 1976 la individua membraro nombris 274 (4,55% de la tuta membraro de UEA), kompare kun 275 en 1975. Estis 30 patronaj membroj en 1976, kompare kun 29 en 1975.

(3) Servoj: En la kadro de la restrukturigo de la servoj de TEJO, forstrekiĝis ĉi-jare la Koresponda Servo, kiu fariĝis duoblaĵo de la samspeca servo de UEA. Aperis denove la kalendaro de la Turisma Servo, kiu listigis 92 renkontiĝojn por junuloj. La plej elstara restis la **Pasporta Servo**, kiu ebligis al almenaŭ kvindeko da personoj senpage gastigi dum minimume 240 tagoj en 1976. En februaro 1977 aperis la 4a listo de gastigantoj, rekorde ampleksa. Ĝi prezentas 240 adresojn en 40 landoj.

(4) Internacia Junulara Kongreso: La plej granda IJK en dek jaroj okazis en Tesaloniko kun 350 partoprenantoj kaj la temo "Lingvo kaj socio". La kongreso liveris ankaŭ finanĉan profiton, kiu altigis la saldon de la TEJO-fondaĵo ĝis ĉ. 6000 gld. kaj provizis al la greka junulara sekcio atentindan monsumon. Por plena raporto pri la 32a IJK kaj la junulara partopreno en la 61a UK v. *Esperanto*, sept. 1976. La 33a IJK okazos en Poitiers (Francio) de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 1977 kun la temo "Perspektivoj por junulara movado".

(5) Landaj sekcioj: TEJO nun havas 28 landajn sekciojn. Pretiĝas por la Komitato en Poitiers aliĝpetoj de la junularo en Finnlando kaj Kanado. La jenaj landoj raportis sian membronombron por 1976 (la unua nombro indikas membrojn ĝis 25-jarajn, kaj la enkrampa pli ol 25-jarajn): Belgio 70, Brazilo 16 (25), Britio 90, Bulgario 2200 (900), Danlando 45 entute, Germana DR 90 (80), FR Germanio 683 (13), Hungario 1040 (60), Italio 300 (20), Jugoslavio 3000 (1500), Nederlando 60 (25), Nov-Zelando 41 (40), Pollando 1300 (700), Svedio 120 entute. Ampleksa 6-paĝa enketilo iris al ĉiu LS en novembro 1976. La rezulta raporto provizos la bazon por pli proksima kunlaboro

inter la LS kaj TEJO. Rimarkindas la grandigo de pluraj el la internaciaj kunvenoj organizataj de la LS: La 20a Internacia Seminario de GEJ, la februara renkontiĝo de la nederlanda kaj la aprila festivalo de la itala landaj sekcioj allogis rekordajn partoprenantarojn. Junularaj renkontiĝoj estis krome organizitaj en Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Danlando, Francio, Germana DR, Hispanio, Hungario, Israelo, Jugoslavio, Nov-Zelando, Pollando, Svedio kaj Svislando.

(6) Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER): La Komisiono okazigis du seminariojn: en Romo kaj Katlenburg (FR Germ.) kaj kunlabore helpis pri la seminario en Sarajevo. Temoj laŭvice estis "Lingva demokratio", "Motivoj kaj celoj de lingvo-politiko" kaj "Lingvo kaj rasismo". Entute ilin partoprenis ĉ. 150 personoj (esperantistoj kaj neesperantistoj). La reprezentiĝo de TEJO ĉe aliaj konferencoj iom malkreskis. Menciinda tiurilate estas la partopreno en la Eŭropa Junulara kaj Studenta Amaskunveno pri Sekureco, kunlaboro kaj paco en Varsovio (junio 1976). Eldona agado daŭris: Interalie aperis *Lingvo kaj malkoloniigo*



(raporto pri 2 seminarioj en 1975) kaj la nova broŝuro de Renato Corsetti *Por la defendo de afrikaj kulturoj*, eldonita en la angla kaj franca. Kvanton de ĝi oni sendis al Afriko. KER daŭre strebis instigi intereson pri sia agado kaj kunlaboremon inter la membraro de TEJO. Subvencioj estis ricevataj de la Eŭropa Junulara Fonduso por la seminario en Romo kaj administraj elspezoj. Dum la IJK, la Komitato aprobis "ĝeneralan gvidlinion de KER". En majo 1977, KER-representanto entreprenis vojaĝon al pluraj landoj por diskonigi la laboron de KER ĉe Esperanto-aranĝoj kaj viziti la sidejojn de kelkaj neesperantistaj junularaj organizaĵoj.

(7) Eldonaĵoj: *Kontakto* aperigis 4 numerojn en la unuaj ok monatoj de la laborjaro, cele al 7 numeroj inter la du IJK. La reaktualigo de la revuo estas la unua etapo en plano, kies dua parto estas reklamkampanjo por signife grandigi la abonantaron kaj variigi la en-

havon. La nuna asista redaktoro, Jouko Lindstedt el Finnlando, transprenos la redaktadon ekde numero 55, en septembro 1977. La emfazo de *Kontakto* restos je ekster-movadaj temoj, aparte interesaj por junuloj, sed la revuo iom sekvas la evoluon de TEJO, specife per antaŭprezento kaj posttakso de la aranĝoj. *Koncize*, la komuna gazeto de kvin landaj sekcioj, TEJO kaj KER, regule kaj akurate aperis en 900 ekzempleroj, ĉiun duan monaton. Altiĝis la preskvalito kaj grandiĝis la amplekso de 8 ĝis 12 paĝoj. "TEJO-paĝo" pli-malpli regule aperis en la revuo *Esperanto*, dank' al pozitivaj reagoj al la alvoko al LS pli regule kontribui. *Info* re-aperis dum la jaro, kun nova tasko informi la individuan membraron (kiu ĝenerale ne ricevas *Koncize*) pri novaj paŝoj en la TEJO-agado. Redaktita de la ĝenerala sekretario, ĝi ekspediĝas kun *Kontakto*.

(8) Varbado: La aliĝilo "Ĉu vi partoprenos en Oslando?" estas la ĉefa armilo en la novelanĉita varblukto. La unua preso de 2000 elĉerpiĝis en 2 monatoj; sekvis re- preso de 3000. Reklamoj pri TEJO, *Kontakto* kaj la Pasporta Servo aperis en pluraj E-presajoj. Enfokusigi atenton pri varbado celas "Varbumo", debato (diskuta kaj praktika) dum la IJK en Poitiers. Ĝi identigos la diversajn grupojn al kiuj TEJO havas mesaĝon (la Esperanto-junularo, la ne-Esperanta junularo, membroj de la Movado, gvidantoj de la Movado) kaj kristaligos la mesaĝon, kiun oni volas komuniki al ili. Sekvas ekzameno de la vortoj, komunikiloj kaj rimedoj per kiuj TEJO plej efike peru tiujn mesaĝojn.

(9) Konkludo: Post la granda atento kiun TEJO donis en la lastaj jaroj al ekstera agado, evidentiĝas, ke ankaŭ la interna organizo bezonas konstantan flegadon. Multo el la ĉi-jara laboro ne produktis tuj videblajn rezultojn, sed establis la bazojn, kiuj ebligis estonte pli fortan kaj utilan agadon.

12. LANDA KAJ FAKA AGADO

A. LANDA AGADO

Stabilan staton en la landaj asocioj montras la membrociferoj en la revuo *Esperanto* de marto 1977. Tiu stabileco koncernas kaj la enlandan membraron kaj la fidelecon al UEA. Ĉi-lastata konstato estas des pli agnoskinda, ĉar en multaj valutoj la membrotizo de UEA kreskis. Kvankam UEA postulis precize 50 guldenojn en 1977, samkiel en 1975, altiĝis en kelkaj landoj la kotizoj en landa valuto je parte konsiderindaj procentaĵoj: Israelo 97 %, Brazilo 56 %, Italio 54 %, Britio 39 %, Nov-Zelando 29 %, Hispanio 20 %, Jugoslavio 15 %, Finnlando 10 %, Japanio 7 %, ktp. Ni dankas al la esperantistoj en la inflaciaj landoj, ke ili spitis tiujn "kotizaltiĝojn". La informoj en la revuo *Esperanto*, *Heroldo* kaj multaj landaj periodaĵoj ankaŭ montras la aktivadojn de niaj landaj asocioj. Al la rondo de aliĝintaj landaj asocioj aldoniĝis en 1976 kvin novaj (v. *Esperanto*, dec. 1976). Nuntempe aliĝoj de du pliaj landaj asocioj ekster Eŭropo estas traktataj. Esperanto ankaŭ vivas kaj disvastiĝas tie, kie membrociferoj ne konstatigas tion. Amplekse raportis pri tio

la revuo *Esperanto*: Ĉinio en junio 1976, Koreo (kaj Japanio) en novembro 1976, Irano en decembro 1976, Kolombio en februaro 1977, kaj informoj aperis i.a. pri Kostariko en februaro 1977, pri Vjetnamio en marto 1977. Suman priskribon donas la ĉefartikolo en la marta numero de la revuo. Multaj unuopaj informoj pruvas antaŭeniron en la disvastiĝo de la Internacia Lingvo tra la mondo, eĉ se malrapide.

Pliajn sukcesojn kontraŭstaras du gravaj malhelpoj: Unue, temas pri monproblemo. El multaj ŝtatoj tute ne eblas transpagi eksterlanden. Se tio eĉ eblas, alta inflacio bremsas la rilatojn. Kiel kotizu al UEA argentinano, por kiu la 50 guldenoj valoris en 1977 594 % de la sama sumo en 1975? Estas antaŭvideble, ke la transpagaj problemoj plimultiĝos. Due, en pluraj ŝtatoj regas cirkonstancoj, en kiuj kontaktoj kun eksterlando estas io malfavorata de la registaro. Tiu situacio antaŭvideble ne ŝanĝiĝos baldaŭ. Eĉ la konferenco de Helsinki ĉi-rilate rezultigis pli da problemoj ol da solvoj.

Se tamen progresoj okazis en la landaj laboroj, tio ŝuldiĝas al la intensa laboro de la landaj funkciuloj kaj la respondeculoj en UEA. La komisiono pri landaj asocioj kunsidis dum la UK en Ateno. Ĝi traktis kiel ĉeftemon la helpon al novaj landaj grupiĝoj. Ankaŭ la kunveno de respondeculoj el landaj asocioj pristudis eblan helpon de establitaj landaj asocioj al la ĝermantaj movadoj. Pro tiu ĉi temo, la kunsido estis kunigita kun la kunveno pri la evoluigo de la movado en la tria mondo. Se tiom multe estis farita lastatempe sur tiu ĉi laborkampo, tio ne evoluis sen efika helpo de UEA. Esencan laboron faris la komisiito de UEA pri regiona agado, d-ro R. Corsetti, kaj la UEA-estrarano pri landa kaj regiona agadoj, d-ro W. Bormann, kiu plu flegis siajn multajn kontaktojn kun la kolegoj en la landaj asocioj kaj la neorganizitaj landaj movadoj. Kroma instigo por ĉiu kontaktado estis la kolektado de la statutoj (en Esperanto) de ĉiuj landaj asocioj, kio fine sukcesis. Evidentiĝis, ke ne ekzistas kaŭzoj por plendoj kontraŭ iu ajn el la statutoj. Personaj kontaktoj ekster la kadro de la UK restis malforta punkto en la kontaktado pro la financa neeblo multe vojaĝi, precipe ne al la distancaj landoj, kie estas la plej gravaj problemoj. Sed estraranoj kaj stabanoj de la CO grave kontribuis nodi personajn rilatojn inter la funkciuloj centraj kaj landaj.

B. FAKA AGADO

En ĉi tiu laborperiodo ne okazis ŝanĝoj rilate la nombron de la aliĝintaj kaj kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj, pri kio vidu la ĉap. 2(6). Intertraktoj pri aliĝo de du pliaj fakaj asocioj, kiel kunlaborantaj, daŭris dum la jaro kaj nun atendas voĉdonon de la Komitato. Krome, okazas preparoj por fondo de du aŭ tri pliaj fakaj asocioj. Kiel kutime, pluraj fakaj asocioj jarkunvenis en la kadro de la UK, sed kelkaj aranĝis proprajn kongresojn, ekz. IFEF (fervojistoj) kongresis en Svedio (482 kongresanoj), KELI (kristanoj) en Francio (74 partoprenintoj) kaj LIBE (blinduloj) en

Aŭstrio (ĉ. 100 kongresanoj). Tre signifa povus montriĝi la ekapero de la revuo *Scienca mondo* (v. ankaŭ en la ĉap. 9B.) en Esperanto. Tio estas grava pliriĉigo de la magra familio de la fakaj periodaĵoj en la Internacia Lingvo. Ornitologia Rondo Esperantlingva atingis, ke Fondaĵo Monda Alternativo (bazita en Nederlando) alprenis ankaŭ Esperanton (apud la angla), kiel laborlingvon. La 3a sesio de Someraj Universitataj Kursoj efektiviĝis en aŭgusto 1976 en la Universitato de Antverpeno, sub la aŭspicio de UEA, kiu ankaŭ materie subtenis la aranĝon. La sesio pritraktis la fakojn biologio, matematiko kaj sociologio. Oni daŭrigis la eldonadon de la kurstekstoj, kio montriĝas unu el la plej signifaj kontribuoj al la faka literaturo en Esperanto.

El 23 aliĝintaj kaj kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj, 82% raportis pri sia agado al la UEA-estrarano pri faka agado. Krom la jam menciitaj atingoj, elstaras la aktiveco de Skolta Esperanto-Ligo, kiu preparis gvidlibron pri internacia skolta kunlaboro en ok naciaj lingvoj, i.a. en la araba kaj japana, kio apogas la klopodojn de UEA disvastigi la Internacian Lingvon en Azio kaj Afriko. Tiucele SEL sendis centojn da lernolibroj al nepagipovaj landoj. Fervojistoj raportis, ke en kvin landoj la fervojaj horaroj aperigis "ŝlosilojn" ankaŭ en Esperanto. Medicinistoj informas pri aperigado de regulaj resumoj en Esperanto en nacilingva faka revuo (Hungario) kaj de apartaj esperantlingvaj periodaĵoj (Brazilo kaj Ĉeĥoslovakio). Poŝtistoj faris plian klopodon penetrigi Esperanton kiel laborlingvon de la Universala Poŝta Unio. Pluraj fakaj asocioj (fervojistoj, sciencistoj k.a.) raportis pri terminologiaj laboroj; kelkaj aranĝis ekskursojn, renkontiĝojn kaj festivalojn.

13. ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Okazis dum 1976-77 signifa progreso. La kunsidoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) en Ateno, kaj la tieaj decidoj de la Komitato, fiksas la agadplanojn de UEA sur tiu ĉi kampo. Sub gvido de tripersona estraro (d-ro J. Pool, Usono; d-ro D. Blanke, GDR; d-ro U. Lins, FRG), CED nun disvolvas plurflankan agadon dividitan en tri branĉojn: studado de lingvaj problemoj, esperantologio, kaj kontaktado kun Esperanto-organizoj.

(1) Eldonaĵoj de CED: La revuo de CED, *La monda lingvo-problemo*, en 1977 ŝanĝis sian titolon kaj iome sian direkton. Kiel anoncis artikolo en la januara *Esperanto*, ĝi nun portos la titolon *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado (LPLP)* en pluraj lingvoj, kaj ĝiaj artikoloj, kvankam ili emfazos la internacian lingvo-problemon, kovros ankaŭ la tutan terenon de la naskiĝanta studfako de lingvo-politiko kaj lingvo-planado. Tiuj ŝanĝoj malfermis la vojon inter CED kaj eminentaj lingvistikaj rondoj, tiel ke *LPLP* jam arigis ĉirkaŭ si imponan redaktan komitaton, kiu inkluzivas la plej elstarajn figurojn en la aplikita lingvistiko. Inter la jamaj aliĝintoj al la redakcia komitato estas ekzemple C.C. Berg (Nederlando), A. Capell


(Aŭstralio), Joshua Fishman (Usono), Charles Ferguson (Usono), V. Georgiev (Bulgario), Samir Ghosh (Hinda Unio), Einar Haugen (Usono), Guy Héraud (Francio), Heinz Kloss (FR Germanio), Mario Pei (Usono), Alexander Szalai (Hungario), kaj Gaston Waringhien (Francio). Redaktas prof. Richard Wood. Daŭre eldonas la revuon Mouton (Hago kaj Parizo).

Aperis plia numero de la *Novaŭletero por interlingvistoj*, redaktita de U. Lins. CED ankoraŭ esploras la eblecon eldoni kajeran periodaĵon de esperantologiaj studoj (vidu la pasintjaran raporton). Preparataj por eldono estas la tekstoj de la prelegoj de J.C. Wells dum la UK en Ateno, sub la titolo *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*.

(2) Esploraj laboroj: Aldone al la regula dokumentada laboro, CED kunhelpas en kompilado de granda tutmonda bibliografio de vortaroj (vidu *Esperanto*, marto). Gvidas por CED M. Ĝivoje (Jugoslavio) kaj E. Ockey (Britio). CED estas ankaŭ kunlaboranto de pluraj lingvistikaj centroj kaj organizoj.

(3) La rolo de la Centra Oficejo: Dum 1976-77 la eldonado de dokumentoj nur malrapide progresis, precipe pro manko de homaj fortoj, sed tiu problemo survojas al solvo. *Esperanto-dokumentoj* aperintaj inkluzivas tiujn de E. Bormann pri la Internacia Jaro de la Virino kaj de T. Tyblewski pri Esperanto en turismo.

Estraranoj de CED: d-ro Detlev Blanke (dekstre), d-ro Ulrich Lins (sube maldekstre) kaj d-ro Jonathan Pool (sube dekstre).



(4) Aliaj agadoj: La seriozan pritrakton de Esperanto, kiel temo por faka studado kaj kiel ekzistanta kaj grava lingva fenomeno, respegulas abunda agado ĉirkaŭ kaj ekster UEA en universitatoj, esplorinstitutoj ktp. Simpla trarigardo de la revuo *Esperanto* donas detalojn pri ekzemple seminario pri lingvo kaj rasismo, en Jugoslavio (novembra numero); seminario pri lingva demokrateco, en Italio (januara); kaj konferenco pri interlingvistiko en scienco kaj klerigo, en FR Germanio (januara); ĉiuj kun signifa ekstera parto-

preno. Oni povas legi ankaŭ pri signifaj nacilingvaj studoj redaktitaj de Isaev (marta) kaj Corsetti (marta), kaj esperantlingvaj studoj en redakto de Szerdahelyi (oktobra) kaj Tišljär (januara). Iom post iom komencas aperi pli ofte artikoloj pri Esperanto en nacilingvaj revuoj lingvistikaj kaj socisciencaj. Libroforme, fine de 1976 aperis ampleksa (473p.) verko de Gim Sam-su, *Historio de Esperanto-movado en Koreujo (1906-1975)*, korelingve eldonita de universitata eldonejo en Seŭlo.

14. FINAJ VORTOJ

Ĉi tiu Raporto, kiu kovras la agadperiodon inter la 1-a de aprilo 1976 kaj la 31-a de marto 1977, celas resume prezenti la tuton de la multflanka kaj vere tutmonda aktiveco de la ĉefa organiza forto en la internacia Esperanto-movado. Kiel aludite lige al la pasintjara Ra-

porto, temas ĉi tie ne nur pri la laboro de unuopaj institucioj, instancoj aŭ fakoj de Universala Esperanto-Asocio mem, sed la Raporto ankaŭ ĉi-foje celas esti rentgena fotografaĵo de preskaŭ ĉio atentinda en la pasintjaraj vivo kaj evoluo de la Internacia Lingvo kaj la movado, kiu okupiĝas pri ĝi. Trastudinte la paĝojn de ĉi tiu Raporto, oni ne povas ne veni al konkludo, ke la Esperanto-movado efektive frontas decidan tempon en sia historio. La afero de la Internacia Lingvo ĉiutage fariĝas pli kaj pli demando de la tuta homaro, anstataŭ esti objekto de entuziasma prefero de internacia movado, eĉ se relative granda. Tiun entuziasmon, al kiu la Internacia Lingvo cetere dankas sian nunan staturon, ni ja bezonos ankoraŭ dum multaj jaroj. Tamen, la karakteriza trajto de la pasinta jaro — kaj espereble de la jaroj, kiuj venos — estas la fakto, ke pri Esperanto ĉiam pli okupiĝas naciaj kaj internaciaj, nemovadaj, institucioj kaj instancoj.

Financaj aldonaĵoj al la Raporto

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO SPEZOJ EN LA JARO 1976

KOSTOJ	Rezultoj	Buĝeto
Salajroj malnete	138 172,33	150 800
Sociaj asekuroj, devigaj al UEA	27 066,29	31 650
Minus kompensoj pro malsano	- 586,02	- 2 400
Salajroj, nete	164 652,60	180 050
Afranko kaj telefono	17 032,92	13 000
Presaĵoj	5 949,70	6 500
Materialoj	6 563,56	7 000
Riparo de maŝinoj	1 871,72	3 000
Revizoroj, trinkaĵoj, diversaĵoj	1 620,50	1 300
Oficejo, nete	33 038,40	30 800
Fotokopiado	6 969,33	-
Minus vendoj de fotokopioj	- 1 745,82	-
Fotokopiado, nete	5 223,51	2 000
Varmigo, lumo, akvo	5 772,05	4 000
Riparoj, purigiloj	1 154,17	5 000
Asekuro kaj impostoj	2 573,41	1 600
Minus lupago pro ĉambroj	- 720,00	- 700
Oficeja domo, nete	8 779,63	9 900
Preskostoj "Esperanto"	28 555,00	22 300
Sendokostoj	30 041,28	24 600
Kovertoj k.a. kostoj	3 443,04	1 800
Minus anoncoj	- 11 280,46	- 4 700
"Esperanto", nete	50 758,86	44 000
Preskostoj de la Jarlibro	13 455,00	16 500
Sendokostoj de la Jarlibro	5 178,35	6 000
Kovertoj ktp.	1 075,38	800
Minus anoncoj	- 6 653,78	- 6 300
Jarlibro, nete	13 054,95	17 000
Preskostoj "Kontakto"	2 973,47	3 700
Sendokostoj k.a. kostoj	1 877,94	2 300
Minus anoncoj	- 5,75	-
"Kontakto", nete	4 845,66	6 000

Veturkostoj oficistaj ĉiutagaj	1 601,81	2 700
Vojaĝkostoj oficejaj (UK k.s.)	8 280,79	2 000
Vojaĝkostoj estraraj	6 096,30	6 100
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	15 978,90	10 800
Volontula Servo	13 073,59	9 000
Korespondkostoj estraraj	8 943,22	7 000
Bankkostoj kaj kurzdiferencoj	2 556,46	1 500
Premioj, donacoj kaj ceteraj	1 761,05	1 300
Diferencoj de malnovaj jaroj	1 826,74	-
Ĝeneralaj kostoj, entute	6 144,25	2 800
Deprezo de la domo, ĉ. 1%	1 400,00	1 400
Deprezo de maŝinoj, ĉ. 10%	8 047,67	6 600
Deprezoj, entute	9 447,67	8 000
Gajno por 1976	26 544,32	-
Finsumo	360 485,56	327 350

RIMEDOJ	Rezultoj	Buĝeto
Kotizoj MJ	14 780,93	
Kotizoj MA	167 169,96	
Kotizoj J-MJ	322,20	
Kotizoj J-MA	3 895,73	
Kotizoj MA-K	4 998,25	
Individuaj membroj sume	191 167,07	212 800 (inkl. MSZ)
Asociaj membroj	23 273,04	24 000
Simplaj abonoj "Esperanto"	5 322,25	5 000
Kolektivaj abonoj "Esperanto"	10 674,50	6 000
Kongresaj abonoj "Esperanto"	5 810,00	9 000
Abonoj "Kontakto"	1 927,96	2 000
Societo Zamenhof	26 762,92	-
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	1 088,96	1 300
Kotizoj, entute	266 026,70	260 100
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	6 483,54	5 000
Vendoj de la libroservo	113 913,96	
Minus kostoj de la varoj	- 77 807,56	
Triono de sendokostoj	3 370,01	
Libroservo, nete	39 476,41	33 000

Abonservo, nete	3 266,34	2 000
Grafikaj laboroj	6 838,94	2 000
20% de UK-kotizoj	17 858,99	16 000
50% de licencpago de IJK	3 564,07	750
Kongresoj, entute	21 423,06	16 750
Rento, nete	10 599,23	4 000
Diferencoj de malnovaj jaroj	1 967,23	-
Diversaĵoj	446,05	-
Ĝeneralaj rimedoj, entute	2 413,28	500
Kompenso de kostoj, DM-oj	3 198,06	
Kompenso de kostoj por CED	800,00	
Kompenso de kostoj	3 998,06	4 000
Sumo de la rimedoj	360 485,56	327 350

BILANCO DE UEA JE LA 31a de DECEMBRO

AKTIVOJ	1976	1975
Kurantaj bankkontoj	54 291,12	6 857,49
Bankaj ŝparkontoj	125 986,00	22 633,80
Poŝtaj ĝirkontoj	11 617,79	23 772,78
Poŝtaj ŝparkontoj	175,53	29 875,98
Kaso kaj respondkuponoj	1 197,04	666,40
Monrimedoj entute	193 267,48	83 806,45
Valorpaperoj	68 665,00	48 451,32
Ricevotaj enspezoj	38 383,25	11 893,01
Antaŭpagitaj elspezoj	9 759,93	447,61
Debitoroj	169 677,79	156 184,76
Provizoj libroservaj	159 116,82	169 609,69
Presaĵoj, materialoj k.s.	20 465,95	19 225,42
Provizoj entute	179 582,77	188 835,11
Maŝinoj kaj mebloj	38 882,68	29 404,79
Garantiaj sumoj	130,00	130,00
Domo de UEA, Rotterdam	130 400,00	131 800,00
Tereno Aspremont	1,00	1,00
Sumo de la aktivoj	828 749,90	650 954,05

PASIVOJ	1976	1975
Rezervo, valoro de libroj k.s.	15 000,00	15 000,00
Antaŭricevitaj enspezoj	80 505,29	89 963,44
Pagotaj elspezoj	61 866,26	48 682,14
Kreditoroj	189 596,34	145 924,67
Ŝparkontoj de membroj	3 978,68	3 978,68
Fondaĵo Azio-Afriko	755,87	775,09
Fondaĵo Canuto	346,03	177,69
Konto CED	2 107,67	2 644,25
Fondaĵo Enciklopedio	374,17	279,67
Eldona fondaĵo	688,36	654,59
Financa programo	53 051,92	5 494,50
Kongresa Rezerva Fondaĵo	21 722,95	18 002,61
Fondaĵo Oficeja Ilaro	5 200,00	200,00
Premio Raymond Schwartz	4 304,82	-
Propaganda Konto	47 514,52	27 584,34
Fondaĵo TEJO	6 098,71	1 203,80
Fondaĵoj entute	142 165,02	57 016,54
Kapitalo Dumvivaj Membroj	261 665,46	252 554,52
Cetera kapitalo	73 972,85	37 834,06
Asocia kapitalo entute	335 638,31	290 388,58
Sumo de la pasivoj	828 749,90	650 954,05

REVIZORA RAPORTO

pri la librotenado kaj agado de la CO de UEA dum la jaro 1976 (art. 40 de la Statuto)

Plenumante la artikolon 40 de la Statuto de UEA, ni, subskribintoj T. Boersma kaj P. Peeraerts, komitatanoj-revizoroj, kunvenis la 22-an de majo 1977 en la C.O. Ĉeestis la kunvenon ankaŭ D-ro V. Sadler, la Direktoro de la C.O.

Ni ricevis ĉiujn detalajn informojn de la Direktoro. Malkonforme al nia konstato pasintjara, ke la prokrastiĝo en la librotenado plene malaperis, je nia bedaŭro ni nun devas raporti, ke ĉirkaŭ la jarŝanĝiĝo pro la manko de librotenisto denove ekestis prokrastiĝo. Se la Asocio ne baldaŭ sukcesos dungi apartan librotenan funkciulon, daŭre restos la danĝero de prokrastiĝo konstanta, kiu estos forigebla nur koste de multaj kromlaboraj horoj farendaj de homoj jam sufiĉe peze ŝarĝitaj.

Kvankam la debitora sumo kompare al la pasinta jaro kreskis en la bilanco, ni devas rimarkigi, ke inter la debitoraj sumoj troviĝas ekzemple soci-asekuraj repagoj kaj ŝuldoj de kotizperantoj, kiuj intertempe jam grandparte estas likviditaj.

Ankaŭ ĉi-jare la Asocio estu tre danka al ĉiuj funkciuloj, kiuj denove laboregis dum la tuta jaro.

Ni proponas al la Komitato, ke ĝi malŝarĝu la Estraron pro la financa gvidado de la Asocio en 1976.

De Hoeve kaj Antwerpen,

T. Boersma, P. Peeraerts.

61-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Ateno, 1976

SPEZOKONTO (en guldenoj)

ELSPEZOJ	Rezulto	Buĝeto
Pago al UEA: 30% de kotizoj	26 788,49	24 043
Repago al helpantoj	666,70	2 500
Makleraĵo de perantoj	2 262,22	1 500
Infana kongreseto	1 897,09	4 000
Inaŭguro	2 194,54	5 000
Interkona vesperc	-	500
Teatra vespero	8 167,65	10 000
Nacia vespero	5 217,75	5 000
Internacia vespero	4 147,06	3 000
Balo	931,98	2 000
Filmprezentoj k.a.	2 875,63	1 000
ISU: honorarioj	1 954,00	2 000
Bankedo	7 398,67	7 500
Kongresejo	3 615,91	2 000
Aliĝilo	1 013,00	1 200
Unua bulteno	136,00	-
Dua bulteno	3 042,00	3 500
Kongresa libro k. suplemento	8 243,00	8 000
Glumarko	697,00	700
Insignoj	900,00	2 000
Presaĵoj, fotokopioj	1 433,65	2 000
Materialoj	317,15	2 000
Reklamado	362,44	2 000
Gazetara Servo	1 626,02	3 000
Afranko	6 075,38	6 500
Telefono, telegrafo	1 125,93	

Transporto	1 406,53	1 300
Veturadoj enlandaj	1 245,79	2 500
Oficejo	2 858,74	3 000
Bankkostoj, kurzdiferencoj.	53,58	-
Diversaĵoj	550,21	3 600
Oficialaj akceptoj	5 031,78	-
Gajno	37 203,34	-
Sumo de la kostoj	141 439,23	111 343

RIMEDOJ	Rezulto	Buĝeto
Kotizoj	89 294,97	80 143
Infana kongreseto	-	3 000
Ekskursoj, nete	19 264,67	5 000
Bankedo	10 915,00	10 500
Libroservo	284,44	1 000
Glumarkoj	821,89	1 000
Anoncoj, reklamiloj	3 338,35	3 000
Subvencioj, donacoj	7 328,43	-
Loĝmakleraĵo	2 467,36	2 500
Postkongreso, nete	6 304,44	5 000
Fakaj kunsidoj	290,00	200
Rento	280,34	-
Diversaĵoj	849,34	-
Sumo de la rimedoj	141 439,23	111 343

BUĜETO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO POR LA JARO 1978

KOSTOJ

Salajroj malnete	227 500
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	50 000
Minus kompensoj pro malsano	- 1 500
Salajroj, nete	276 000
Afranko kaj telefono, nete	20 000
Presaĵoj	7 000
Materialoj	6 500
Riparo de maŝinoj	4 000
Trinkaĵoj, revizoroj	1 800
Oficejo, nete	39 300
Fotokopiado	12 000
Minus vendo de fotokopioj	-12 000
Fotokopiado, nete	-
Varmigo, lumo, akvo.	6 000
Riparoj, purigiloj	3 800
Asekuro, impostoj	2 700
Minus lupagoj pro ĉambroj	- 800
Oficeja domo, nete	11 700
Preskostoj, "Esperanto"	36 400
Sendokostoj (1)	50 000
Kovertoj k.a. kostoj	3 000
Minus anoncoj	-20 000
"Esperanto", nete	69 400
Preskostoj de la Jarlibro	15 100
Sendokostoj, kovertoj	6 800
Minus anoncoj	- 8 000
Jarlibro, nete	13 900

* Inkl. 14 000 por senpaga aerpoŝta sendo al ĉiuj ekster-eŭropaj abonantoj.

Preskostoj "Kontakto"	5 200
Sendokostoj, banderoloj	2 600
"Kontakto", nete	7 800
Veturstoj oficistaj ĉiutagaj	2 000
Vojaĝkostoj oficejaj (UK k.s.)	7 000
Vojaĝkostoj komisionaj	2 000
Vojaĝkostoj estraraj	7 500
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	18 500
Volontula Servo	26 500
Korespondkostoj estraraj	9 000
Bankkostoj, kurzdiferencoj	2 500
Konkursoj, diversaĵoj	2 500
Ĝeneralaj kostoj, entute	5 000
Deprezo de la domo, ĉ. 1%	1 300
Deprezo de la maŝinoj, ĉ. 10%	8 000
Deprezoj, entute	9 300
Sumo de la kostoj	486 400

RIMEDOJ

Kotizoj MJ (Membro kun Jarlibro)	25 400
Kotizoj MA (Membro-Abonanto)	166 100
Kotizoj MJ-K, MA-K (kun "Kontakto")	11 300
Individuaj membroj, sume	202 800
Asociaj membroj	26 400
Simplaj abonoj "Esperanto"	5 900
Kolektivaj abonoj "Esperanto"	39 500
Kongresaj abonoj "Esperanto"	24 000
Abonoj "Kontakto"	2 600
Societo Zamenhof	24 200
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	1 400
Kotizoj, entute (2)	326 800*
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	6 000
Vendoj de la libroservo	165 500
Minus kostoj de la varoj	-119 900
Triono de la sendokostoj	5 500
Libroservo, nete	51 100
Abonoj je nepropriaj gazetoj	10 000
Minus kostoj de la gazetoj	- 6 500
Abonservo, nete	3 500
Grafikaj laboroj, Rotterdam	50 000
Minus kostoj eksteraj	-30 000
Grafikaj laboroj, Rotterdam	20 000
Grafikaj laboroj, Antverpeno	6 000
20% de UK-kotizoj	25 600
50% de licencpago de IJK	3 000
Kongresoj entute	28 600
Diversaj turismaj aranĝoj	12 000
Rento, nete	10 000
Ĝeneralaj rimedoj, entute	3 000
Kompenso de kostoj, DM-oj	5 000
Kompenso Financa Programo	11 400
Kompenso de kostoj por CED	3 000
Kompensoj de kostoj	19 400
Sumo de la rimedoj	486 400

* Inkl. ĝeneralan altigon 10%.

Ekvadoro

• Ĉi tiu sud-amerika lando antaŭe verŝajne ne estis menciita en nia revuo, ĉar UEA neniam havis membrojn tie. Nun la situacio ŝanĝiĝas: Komence de majo venis el la ekvadora ĉefurbo Kito letero (en tre bona Esperanto) de d-ro Patricio Zurita, direktoro de la fiziologia fakto en la Medicina Fakultato de la Centra Universitato de Ekvadoro. D-ro Zurita mem lernis Esperanton, akirinte kelkajn librojn el Usono. Pasintjare li provinstruis la lingvon al grupo de siaj studentoj, kiuj entuziasmiĝis pri la afero. Nun oni planas organizi studentan E-klubon en la Universitato. Certe bonvenus ĉia Esperanta literaturo, sendebla al la adreso: D-ro Patricio Zurita, Facultad de Ciencias Médicas, Universidad Central del Ecuador, Quito.

Belgio

• La 25an de aprilo, en Bruselo okazis grava informa kunveno en la Ministerio de Nacia Edukado kaj Nederlanda Kulturo. Antaŭ grupo de inspektoroj pri la lingvoinstruado kaj direktoroj de instruistaj kaj interpretistaj lernejoj parolis s-ro E. Symoens, prezidanto de la nederlandlingva sekcio de ILEI en Belgio. La prelegon kaj la diskuton, kiu sekvis, ĉeestis ankaŭ la ĝenerala inspektoro, s-ro Vandeveld, kaj la registara direktoro, s-ro W. Pottillius. S-ro Symoens ricevis plurajn invitojn prelegi pri Esperanto en belgaj altlernejoj.

• Post la pasintjara unua pilgrima kunveno esperantista en Belgio (kun partoprenantoj el kvin landoj), la 4an de septembro ĉi-jare oni organizas apud Peruweltz (inter Tournai kaj Mons) la duan pilgriman kunvenon, kun la temo "La eklezio en la moderna tempo". Informojn petu de s-ro W.A.M. van Heugten, "Het Daagt", Deurne, N. Br., Nederlando.

Hispanio

• En la Universitato de Cheste (Valencia) okazas E-kurso por 90 studentoj, kiun gvidas s-ro F. Navarro. La kurso estas rezulto de klopodoj de E-grupo en Alicante kaj ties prezidanto, s-ro R. Canet.



• En la kadro de la 61a Brita Kongreso de Esperanto, meze de aprilo en Hastings, kunvenis ankaŭ GRUPO KVIN, pri kiu ni amplekse skribis en nia marta numero. Sur la foto, d-ro John C. Wells, prezidanto de la Grupo, defias d-ron George Steiner al publika televid-debato pri Esperanto (v. nian majan n-ro, p. 96). Maldekstre de d-ro Wells sidas la urbestro de Hastings, kiu fariĝis honora membro de GRUPO KVIN.

Greklando

• Pozitivajn sekvojn de la 61a Universala Kongreso daŭre spertas la Helena Esperanto-Asocio, kies aktiveco ĉiam pli kaj pli vigliĝas. Tion pruvis ankaŭ la solenaĵo antaŭ ne-longe organizita memore al la plej elstara figuro en la historio de la greka Movado, d-ro Anakreon Stamatidis. Aparte rimarkinda dum la aranĝo estis la vigliĝo kaj multiĝo de la junaj membroj kaj la programeroj de la kanthoro, kiu funkcias ĉe la sidejo de la Asocio.

Usono

• La asocio de fremdlingvaj instruistoj en Kalifornio invitis esperantistojn prezentiĝi en la kongreso de tiu organizaĵo, okazinta en aprilo ĉi-jare. Estis aranĝita aparta informa stando, ĉe kiu deĵoris i.a. s-roj Bill Schwartz



kaj Lou Stein (sur la foto). Tio ĉi estis unuafoje, ke Esperanto povis prezentiĝi en simila kongreso, kiun ĉi-jare partoprenis mil geinstruistoj.

Brazilo

• San-Paŭla Esperanto-Asocio (SPEA) viciĝas inter la plej aktivaj lokaj grupoj en Sud-Ameriko. Lastatempe SPEA festis la 40an datrevenon de sia fondiĝo kaj lige al tio okazigis konkurson kaj ekspozicion de infandesignaĵoj. La 23an de aprilo 1977 komenciĝis Esperanto-kurso por 175 gestudentoj de la filozofia kaj beletra fakultato en la najbara urbo Santo André. La kurso estas sekvo de prelego farita de s-ino Elvira Fontes, prezidantino de SPEA kaj komitatanino de UEA. S-ino Fontes ankaŭ gvidas la kurson per kiu la studentoj gajnas poentojn por la studobjekto lingvistiko. Krome, SPEA havas ankaŭ korespondan kurson por multaj partoprenantoj. La organizaĵo ĵus ŝanĝis sian sidejon, translokiĝinte al pli centra ejo (Avenuo São João 1333, 2° andar, conj. 21) en la brazila urbego.

Ĉeĥoslovakio

• Inter la 7a kaj 9a de majo, en Bratislava okazis la 7a Kongreso de Slovakaj Esperantistoj, kiun ĉeestis ĉ. 300 kongresanoj, inter kiuj troviĝis pluraj eksterlandaj gastoj. La Kongreso omaĝis du jubileojn: la 90an datrevenon de la apero de *La unua libro* de d-ro Zamenhof, kaj la 70an datrevenon de la unua slovak lernolibro de Esperanto. Dum la Kongreso okazis solena koncerto, kultura vespero, literaturaj konkursoj kaj lingvaj ekzamenoj.

Virinoj

• En la lastaj tagoj de majo, dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Paderborn (FR Germanio), du aliĝintaj landaj asocioj de UEA elektis virinojn por la prezidanta funkcio: S-ino Elsbeth Bormann fariĝis la 10a prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio, kaj s-ino Akiko Woessink-Nagata ekde nun prezidos la organizaĵon de nederlandaj esperantistoj. S-inoj Bormann kaj Woessink-Nagata jam havas du koleginojn en la prezida funkcio: s-ino Roksano Manus jam dum multaj jaroj prezidas en la Helena Esperanto-Asocio, kaj s-ino M. Haltrecht-Matte pasintjare prezidantiĝis en la Kanada Esperanto-Asocio.

Televido

• Dum la lastaj monatoj, en Italio kaj Jugoslavio, Esperanto plurfoje rolis en televidaj programoj. Laŭ Radio Roma, nur la privata televida stacio "Teleroma 56" en aprilo ĉi-jare elsendis 4 horojn da programo pri Esperanto. Pro favoraj reagoj, ĝi planas elsendi kurson pri la Internacia Lingvo eble jam en aŭtuno de 1977. Ankaŭ en Jugoslavio oftas televidaj programoj ligitaj al Esperanto. Post la programo, kiun por la Televido Zagreb pretigis s-ro Vlado

Jurković, kaj kiu temis nur pri Esperanto, nun esploristo Tibor Sekelj havas tutan serion da televidaj elsendoj pri siaj vojaĝoj kaj ne malofte aludas en ili pri la Internacia Lingvo.

Instruistoj

• Estas jam lasta momento por aliĝi al la 11a Konferenco de Internacia-Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La konferenco okazos en la hotelo "Holiday Inn" en Luksemburgo, inter la 14a kaj 24a de julio 1977. La konferencejo situas tre proksime al la konstruaĵoj de Eŭropa Parlamento (v. la kovrilon de ĉi tiu numero). Aliĝilojn kaj informojn petu ĉe: ILEI-Konferenco, 1, rue de Kehlen, L/Olm, Luksemburgo.

• Fondita komence de la pasinta jaro, PAPIE (Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto) jam havas 50 membrojn. Ĉi tiu faka grupiĝo de Esperanto-instruistoj en la pacifika regiono eldonas ankaŭ revueton *Transoceana*, de kiu en 1976 aperis kvar numeroj. La revueton prizorgas s-ro Trevor Steele ("Bona Espero", 77260 Alto Paraiso, Goiás, Brazilo), kiu ankaŭ prezidas PAPIE.

Informado

• Post la Esperanta lernolibro, kiu produktiĝis ĉefe dank' al financa kaj teknika subteno de Svisa Esperanto-Societo, Malto nun ricevas ankaŭ belan informilon pri la Internacia Lingvo. La 12-paĝan broŝuron *Dwar L-Esperanto* verkis (same kiel la lernolibron) Karmenu Mallia, kaj por la Malta Esperanto-Societo eldonis — donace — Sveda Esperanto-Federacio. Malto tiel akiras bel-aspektan informilon, kiun povus sopiri pluraj landoj kun fortaj asocioj, kaj la Movado jen havas plian belan ekzemplon, kiel oni povas efike helpi la disvastiĝon de Esperanto en novaj landoj.

• Sur la kultura paĝo de *Asahi Sinbun*, la plej granda japana ĵurnalo, la 11an de majo aperis artikolo de Kei Kurisu pri "90 jaroj de Esperanto".

Labortendaroj

• Nun definitive pliaj detaloj pri la esperantista junulara laborbrigado en Jugoslavio, anoncita en nia januara numero (p.14). Ĝi konsistos el 50 gejunuloj, el kiuj 20 el eksterlando, kaj 30 el Jugoslavio. La brigado funkcios dum la tuta monato aŭgusto kaj laboros, kun mil gejunuloj neesperantistoj, en Sarajevo pri hommediaj projektoj. Interesitoj povas peti pliajn detalojn de: Esperanto-centro, Vase Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.

Eldonaĵoj

• La libro de Richard Schulz, *Mein geliebtes Esperanto*, tre pozitive recenzita en nia decembra n-ro, gajnis antaŭ nelonge premion dum kongreso pri varbado kaj merkatesploroj, okazinta en Luksemburgo.

Persone

Tito

• La prezidanto de Jugoslavio, Josip Broz Tito, prelegante komence de marto ĉi-jare en sia naskiĝloko Kumrovec, menciis ke li siatempe en malliberejo i.a. serioze studis lingvojn, "unue Esperanton, kaj poste aliajn". La prezidanto de Jugoslavio verŝajne estas la sola nuntempa ŝtatestro, kiu serioze okupiĝis pri la Internacia Lingvo kaj plurfoje subtenis ĝin per favoraj deklaroj.



• En la vilaĝo St. Gerard, ĉe Namur en Belgio, inter la 14a kaj 22a de majo 1977, kolektiĝis entute 148 gelernantoj, 9- ĝis 11-jaraj, por partopreni la Unuan Internacian Lernejon, kiun organizis la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Temis pri infanoj, kiuj lernas Esperanton en la kadro de la dua lerneja eksperimento de ILEI. La infanoj venis el FR Germanio, Nederlando, Francio, Belgio kaj Jugoslavio. Ĉeestis 18 instruistoj.

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 12

(pri la demando v. nian majan numeron, paĝo 99)

HECTOR HODLER (la 1-a de oktobro 1887 — 31-a de marto 1920) estis la dua redaktoro de la revuo *Esperanto* kaj la fondinto de **Universala Esperanto-Asocio**. Ĉiujare el la rentumo de la kapitalo Hodler la **Institucio Hodler '68** subtenas valorajn kulturajn kaj organizajn agadojn en la Esperanto-movado. La **Biblioteko "Hector Hodler"** (en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam) estas neelĉerpebla trezorejo de historiaj, literaturaj kaj lingvaj eldonaĵoj kaj dokumentoj pri la Internacia Lingvo.

Nekrologoj

FRAN NOVLJAN

En Zagreb (Jugoslavio), la 12an de januaro mortis elstara pioniro de la Movado en Jugoslavio, prof. Fran Novljan (1879-1977), kiu estis eminenta ankaŭ en la ĝenerala kultura vivo de sia regiono (fondinto de popoluniversitatoj kaj aliaj klerigaj institucioj). Li lernis la Internacian Lingvon en 1920 kaj dum jardekoj aktivis precipe sur la lerneja kampo, i.a. verkinte tri E-lernolibrojn. Prof. Novljan postlasis plurajn verkojn ankaŭ en sia gepatra lingvo.

H. NURSALL

La 6an de februaro, en Bedford (Britio), mortis H. Nursall (1905-1977), kiu, kvankam lerninte Esperanton nur post sia pensiĝo, estis unu el la ĉefaj lokaj aktivuloj dum la lastaj jaroj.

CILA BAHORIĆ-RUKAVINA

Meze de marto, en Rijeka (Jugoslavio), mortis s-ino Cila Bahorić-Rukavina (1894-1977), membro de UEA dum la lastaj 38 jaroj kaj delegito de post 1940.

CORNELIS POT

La 21an de aprilo mortis en Slikkerveer (Nederlando) Cornelis Pot (1885-1977), inventinto de la facila muzikskribo por piano kaj orgeno, kiun li titolis per Esperanta nomo "Klavarskribo" (1931). Legate en vertikala direkto, ĝi donas tujan superrigardon pri la tuŝotaj klavoj. Eldonejo, kiu aperigis kurson (en Esperanto kaj la nederlanda) trovas ankaŭ nun grandan debiton por la muzikaĵoj transskribitaj per "klavarskribo". Pot estis dum pluraj jaroj membro-subtenanto (kaj plurfoja donacinto) de UEA, kies dumviva membro li fariĝis en 1958.

JOHN WIDÈN

En Lidköping (Svedio), la 6an de marto forpasis John Widèn (1902-1977), estro de la loka arkivejo, en kiu li kreis konsiderindan Esperantofakon. Li aktivis en la loka movado dum pluraj jardekoj kaj longtempe estis ankaŭ membro de UEA.

JURAJ MAUTNER

La 4an de majo, en Zagreb (jugoslavio), tragike perdis la vivon Juraj Mautner (1948-1977), konstruĝeniero kaj unu el la plej elstaraj aktoroj de la konata Drama Sekcio de la zagreba Studenta Esperanto-Klubo. Dum la lastaj dek jaroj, Mautner ofte prezentiĝis al la internacia publiko, i.a. en la kongresoj de IFEF, SAT, TEJO kaj UEA. Li ĉefrolis en *Aŭtobiografio* de B. Nušić, prezentita dum la 58a UK en Beograd en 1973.

EUFROSINA IONESCU

Inter la viktimoj de la terura tertremo, kiu trafis Rumanion la 4an de marto, kune kun sia edzo pereis en Bukaresto ankaŭ s-ino Eufrosina Ionescu (1910-1977), filologo, esperantistiĝinta antaŭ dudeko da jaroj kaj aktive laborinta por la Movado en la rumana ĉefurbo.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Interŝanĝi poŝtmarkojn kaj korespondi deziras: s-ro Mehmet Telyakar, Aydınlık Sokak 23, İstanbul, Turkio.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, skribu sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj.

Masud Keŝavarz Rahbar, 424 Moshirifard Lane (Rahpeyma Street), Tehran, Irano, serĉas korespondemulojn tutmonde.

Ekde 1977 07 01 mia adreso estos: S-ino Vincent, 26-bis, rue de Milngavie, F-49150 Baugé, Francio.

Anoj de la universitata Esperanto-grupo el Siberio deziras korespondi kun gestudentoj tutmonde. Esperanto-klubo, p.k. 11, SU-656099 Barnaul - 99, Soveta Unio.

Malnovaj Esperanto-revuoj interesas min: Ramon Molera, Moyá (Barcelona), Hispanio.

Pri celoj, vojoj, vivsaĝeco deziras korespondi: Hans Flassbeck, Postfach 1542, D-5300 Bonn I, FR Germanio.

Instruistino pri sociaj sciencoj volas serioze korespondi kun esperantistoj



diverslandaj. F-ino Ĵale Sadighi, 34, K. Cinema Rivoli (Old Shemiran Road), Tehran, Irano.

Apartamenton en Parizo interŝanĝas kontraŭ loĝejo en turisma eksterlanda urbo (Amsterdamo? Barcelona? Londono?) dum unu semajno aŭ semajnfino, ekde julio: Laurin Lewis, 5, square Grangé, F-75013 Paris. Telefono: 707 90 84.

Skribu de ĉie por ekspozicio. Bildkarto kaj turismaj prospektoj bonvenaj. G.E.V. 49, avenue de Saint Cloud, F-78000 Versailles, Francio.

La unua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas jam de jardekoj elĉerpita, la dua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas nun prilaborata, sed oni atendas ĝian aperigon ankoraŭ plurajn jarojn. Feliĉe, ekzistas **ESPERANTO EN PERSPEKTIVO**, kiu estas la movada

enciklopedio de la nuna tempo

Fakuloj epitetoj ĝin jene: monumenta enciklopedia verkego (Waringhien), epopeo (Pool), giganta trezoro (Blanke), senprecedenca entrepreno (Régulo), kvazaŭ streĉa romano (Wells).

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libro servo de UEA.

fariĝu domposedanto


Per aĉeto de akcioj vi realigas novan internacian kulturdomon. — "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof". Informojn petu ĉe: s-ro Sudec, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.

Ĉu kantvoĉo?

MUZILO organizas internacian kantgrupon! Bonvenas ankaŭ neprofesiuloj, kiuj volas kanti en Esperanto. Oni provludos letere. Tio eblas! La celo estas poste prezentiĝi al la internacilingva publiko. Se vi ne kapablas legi la klasikan muzikskribon, ne gravas, ĉar vi povos lerni MUZILON. Ni sendos senpagan lernolibron! Sendu registraĵon de via voĉo kaj foton al: **ESPERANTO-MUZILO**, Skr. poczt. 94, PL-42600 Tarnowskie Góry, Pollando.

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la Koresponda Servo Mondskala de UEA. Adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.



REĜO LEAR estas majstra traduko de majstroverko en prestiĝa eldonserio de UEA. 160p. 21cm. Broŝurita 9,—, bindita 12,— gld. Mendu ĉe UEA aŭ ĉe vialanda libro servo.




Juĝu pri Pasporta Servo survoje

Mendu ĉe J.M. Cash, 9, rue du Languedoc,
F-78690 Les Essarts-le-Roi, Francio, liston de
240 esperantistoj ĉe kiuj, en 40 landoj, vi povos
senpage tranokti. Prezo: 10 f.f. aŭ 8 int. rpk.

survoje al novaj mondoj ni teranoj ankoraŭ
ne posedas komunajn signojn
por parolataj sonoj, do necesas

internacia aboco por nomoj kaj fremdvortoj

28p., 12 x 20cm, öS 54,— al poŝta ĝirkonto
7 503.218 Vieno. D-ro Josef Hartl.



Facila kaj utila helpo

Pro sia profesia okupite-
co, multaj homoj, spite
al siaj deziroj, ne sukces-
as aktivi en la Movado.
Ili tamen estas membroj
kaj regule pagas siajn ko-
tizojn al
diversaj
organiz-
aĵoj. Nu,
ankaŭ

tio estas grava helpo al la
Movado. Vi eble ne havas
tempon varbi novajn
membrojn por UEA kaj
TEJO, sed vi ja trovos
tempon simple disdoni
la du belajn informilojn!
Mendu ilin ĉe: UEA,
Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam.



Ĉu vi
partoprenos

en Oslando?

Simpla lingvaĵo, multaj ilustraĵoj, dukolora
preso kaj varia enhavo igas la revuon



ideala periodaĵo por komencantoj.

Jarabono (3 n-roj) ĉe UEA: 5,70 gld.

Serĉata:

TEKNIKA REDAKTORO

por la revuo de Mouton/CED

Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado

La Volontula Servo de UEA serĉas taŭgan kan-
didaton por teknika helpo al la redaktoro de tiu
prestiĝa plurlingva scienca revuo. La laboro, kiu
konvenus al persono laboranta en propra hejmo,
konsistas plejparte el prespretigo de manuskrip-
toj, dissendo de presprovaĵoj, komparo kaj netigo
de korektoj por la kompostejo, teknika planado
de la enahvo de unuopaj numeroj kaj aliaj
administraj-korespondaj taskoj. Necesas disponi
pri skribmaŝino kaj scipovi almenaŭ pasive plu-
rajn naciajn lingvojn, unuavice la anglan, francan
kaj germanan. Kandidato, kiu havas lingvosci-
encan interesiĝon kaj kiu povas plenumi tiun taskon
dum pluraj jaroj, ricevos preferon. La laboro
postulas eble 2-3 horojn semajne. CED pagos
ĉiujn elspezojn pro afranko, materialoj k.s., sed
la laboro mem estas sensalajra. Sinproponoj estu
adresitaj al la direktoro de la C.O.

VELINGRAD

INVITAS VIN

BEA, ĝia distrikta komitato en Pazardjik kaj Es-
peranto-societo en Velingrad proponas al vi ĝui
dum 14 tagoj pitoreskan montaran naturon, en-
spiri freŝan pinaeron, utiligi kuracajn mineralajn
akvojn — inter la 18a de septembro kaj la 2a de
oktobro 1977 • Bonvolu partopreni la internaci-
an ferio-seminaron en Velingrad • Skribu al: M.
Ĉolev, Str. Br. Krastini 14, 4600 Velingrad, Bulg.